

**87. - Antikva Fiŝbazaro, strato Paŭlo Sarpi n.ro 12, angulo strato Erasmo Valvason n.ro 2.**



La konstruaĵo, nune sidejo de fotekspozicioj, estis propraĵo de la Frataro de la plej Sankta Sakramento kaj ĝi estis aĉetita de Antono Sameda en la jaro 1691.

En la jaro 1796 la domo estis vendita al familio Tomadini kaj en la jaro 1809 Johano Tomadini, butikisto, ĝin luigas al Anna Marcona (Markona).

En la jaro 1925 estas detruitaj kelkaj domoj en strato Valvason, por permesi konstruajn laborojn de aliaj konstruaĵoj kaj de transformo da antaŭaj konstruaĵoj. En tiu okazo estas faritaj ankaŭ la laboroj fare de la komunuma inĝeniero Davido Badini (Udino, 1897 - tie, 1947), kiuj modifas la antikvan konstruaĵon konservante la du etaĝojn. Ĉe la teretaĝo situis la fiŝbazaro.

Davido Badini kunlaboris ankaŭ kun Rajmondo D'Aronco (D'Aronko) (Godo, Ĝemona de Friulo, Udino, 31 aŭgusto 1857 - San-Remo, Imperja, 3 majo 1932) pri la desegnoj de la Udine'a Urbodomo.

La larĝa enirejo, flankita per kvadrataj fenestroj, estas altiĝita per kvinforo subdividita per kolonetoj el ŝtono.

La historia konstruaĵo "liberty", sidejo de la fiŝbazaro ĝis la jaroj naŭdekoj, de la jaro 2009 ĝi estas titolita al la fama fotistino Tina Modotti (Udino, 17 aŭgusto 1896 - Meksiko, 5 januaro 1942), kaj ĝi iĝis konstanta spaco por la ekspozicio de fotoj, deveninte kaj el la gravaj havaĵo gardita en la urbaj muzeoj, kaj ekstere la urbo.

**88. - Palazzo Zucco (Zuko), strato Paŭlo Sarpi n.ro 12.**



Pri palaco Zucco oni havas multajn sciigojn, oni scias nur ke de la jaro 1744 ĝi estas propraĵo de branĉo de la familio Zucco, kiu ĝin tenos ĝis la jaro 1852; poste ĝi pasis al diversaj proprietuloj.

Tombosteleo el kalkoŝtono estas lokita supre la pordego en la interna ĝardeno de la palaco. La surskribo sur ses linioj estas dediĉita al Viola, edzino de Plaŭto Akvilino Primitivo, kaj al Primitiva edzino de Verna kaj filino de Viola kaj Plaŭto.

Antaŭ ol estas portita Udinon ĝi estis en Belinja apud Akvilejo, en la preĝejo aŭ en la kapelo S. Martino; la skribo estas transskribita en la jaro 1533 en paperrulo de la kapitulo de Akvilejo. Poste Cortenovis (Kortenovis) afirmas ke la steleo troviĝas en la domo de la familio Zoccolo (Zokolo), kies reala nomo estas Zucco.

Steleo: V I O L A E – P L A V T I A Q V I L I N – P R I M I T I V O S C O M - I V G E T P R I M I T V Æ - V E R N A C O N I V G - F I L I A E E O R .

**89. - Domo Luzzato, strato Paŭlo Sarpi n.ro 18.**



Deksesjarcenta domo apartenita al d.ro Oskaro Luzzato (Lucato).

La fasado prezentas fenestrojn kaj triforon de la Renesanco. Unu ĉambro estis freskita de Dominico Fabris (Osoppo, Udino, 11 novembro 1814 – tie, 29 oktobro 1901).

Sub la busto al Paŭlo Sarpi (Venecio, 14 aŭgusto 1552 - tie, 15 januaro 1623), artaĵo de Luizo De Paoli (Kordenons, Pordenono, 26 majo 1857 - Pordenono, 17 julio 1947), estas la memorŝtono: PAŬLO SARPI – HISTORIISTO FILOZOFO JURISTO – TEOLOGA KONSILIANO DE LA VENETIA RESPUBLIKO – DEFENDANTO POR LA LIBERECO DE LA KRISTANAJ PREĜEJOJ – POR LA SENDEPENDECO DE LA ŜTATOJ – KONTRAŬ LA PERFORTOJ DE LA ROMA KURIO – MARTIRO DE PENSO – LI ANTAŬIRIS LA DIVENITAN JARCENTON – KIE LA SACERDOTA TIRANECO – MALBENANTE FORPISIS – TRANSOCEANAJ FRATOJ – EN LA KVINDEKJARA DE LA ITALA LIBERIĜO – AL LA NASKIĜA URBO – KUN SENTO DE SINDONA AMO – OFERIS – KAJ HODIAŬ – KIEL ĈIAMDAŬRA ADMONO – SOLENE ILI OFERAS – XX SEPTEMBRO MCMXII

**SARPI Petro**, frato Paŭlo (Venecio, 14 aŭgusto 1552 - tie, 15 januaro 1623), historiisto kaj fakulo pri politiko, servista frato; en 1859 ĝenerala prokuristo de la ordeno; ŝtata konsiliano de Venecio, li subtenis (1606) kontraŭ la roma Kurio, kaŭzinte la interdiktadon por Venecio de papo Paŭlo V (Romo, 17 septembro 1552 – tie, 28 januaro 1621), la rajton de la Respubliko persekuti pastrojn akuzitaj pri komunaj krimoj; objekto en 1607 de atenco; en 1629 li eldonigis en Londono, laŭ la pseŭdonimo Petro Soave Polano, lian *Historio de la Tridentina Koncilio* (verkita inter 1608 kaj 1618 kaj eldonita en Londono en 1619), kiun la katolika Eklezio kondamnis, al ĝi kontraŭmetante tiun de kardinalo Petro Sforza Pallavicino (Sforca Pallaviĉino) (Romo, 28 novembro 1607 - tie, 5 junio, 1667). Rimarkindaj ankaŭ la *Leteroj al protestantoj* kaj la *Speciala historio de la aferoj estitaj inter Paŭlo V kaj Venecio*.

**90. - Domo Cavazzini (Kavazini), strato Savorgnana (Savornjana) n.ro 5 - strato Cavour (Kavur) n.ro 14 a.**



Flanko strato Cavour



Flanko strato Savorgnana

Sidejo de la Muzeo pri Moderna kaj Nuntempa Arto Domo Cavazzini.

Situata inter la stratoj Cavour kaj Savorgnana, vidalvide la urbodomo, ĝi estis objekto de longa restaŭrado, kompletigita en la jaro 2011, laŭ origina projekto de Gae Aulenti (Palacolo de Stella, Udino, 4 decembro 1927 - Milano, 31 oktobro 2012).

Antikve, ĝi estis la loĝejo de grafoj Colombatti (Kolombatti), por iĝi fine propraĵo de teksaĵkomercisto Danto Cavazzini (Gualtieri, Reĝjo Emilia, 27 majo 1890 – Udino, 11 februaro 1987), kiu en la jaro 1937 donis taskon al arkitekto Ermes Midena (Sankta Danielo de Friulo, Udino, 12 septembro 1895 - Udino, 19 oktobro 1972) projekti la restaŭron de la palaco. Midena vokis du el la fratoj Basaldella, Afro (Udino, 4 marto 1912 -

Zuriko, Svisio, 24 julio 1976) kaj Mirko (Udino, 28 septembro 1910 - Kembriĝo, Masaŝuseco, 24 septembro 1969), beligi la internajn ĉambrojn.

La komplekso konsistas el la deksejarcenta palaco Savorgnan (Savornjan) de la Bandiera kaj el la apuda domo Cavazzini, donacita al Komunumo de familio de la komercisto kaj filantropo udina Danto Cavazzini.

La restaŭradoj elfosis arkeologiajn malkovrojn videblaj ĉe la teretaĝo tra la planko el vitro. En la apartamento Cavazzini estas freskoj de Afro Basaldella, Mirko Basaldella kaj Korrado Cagli (Kalji) (Ankona, 23 februaro 1910 - Romo, 28 marto 1976), reirantaj al la Tridekoj jaroj, dume en la palaco Savorgnan de la Bandiera estas anstataŭe freskoj de la dua duono de la Dekkvara jarcento, pentraj atestoj je profana temo kaj tre grava por la studado de la gotika pentrarto en aero friula.

La interveno koncernis la restrukturadon de Domo Colombatti - Cavazzini en strato Savorgnana kaj de la "Legaco Ferrucci" (Ferruĉi) en strato Cavour. La komplekso konsistas el tri konstruaĵoj, kiuj dividiĝas ĉirkaŭ tri internaj kortoj: la ĉefa nukleo; la Domo Colombatti - Cavazzini, estas deksejarcenta origino kaj ĝi estas aranĝita je tri etaĝoj; la "Legaco Ferruĉi", ankaŭ ĝi je tri etaĝoj, estas parto el la konstruata kurteno laŭ strato Cavour kaj ĝi etendiĝas profunde en la parcelon, kuniĝinte perpendikle al domo Colombatti - Cavazzini.

La tre centra Domo "liberty" estis konstruita kun enirejo en strato Cavour. Luma vitropordo akompanas vizitantojn ĉe la enirejo.

91. - **Palaco Valvason - Morpurgo**, strato Savorgnana (Savornjana) n.ro 12.



Sidejo de la Turisma kaj Kultura Skabenejo kaj de Turismaj Infompunkto.

La arkitektaj karakterizoj de palaco Morpurgo instigas konsideri ĝin laboro de Luka Andrioli la Juna, tiĉina ĉefmasonisto de Vico Morcote (Viko Morkote).

La palaco estis konstruita dank'al la kunigo de pli malgrandaj konstruaĵoj loĝitaj ĝis la Dekoka jarcento de la malnova kaj nova nobelaro (familioj Erasmi, Strassoldo, Collredo (Kollredo), Candida (Kandjda), Susanna kaj Burali). Burali-anoj vendis en la jaro 1705 la proprajn al Sarmede-anoj, dinastio de komercistoj, kiuj tute renovigis la komplekson ĝin portante al la nuna formoj.

Ĉi tie loĝis ankaŭ la fama meteologo Hieronimo Venerio (Venerjo) (Udino, 18 septembro 1778 - tie, 4 marto 1843).

Igi palacon Morpurgo-n unu el la konstruaĵoj pli riĉaj je historia kaj arto en la urbo estas la serio de intervenoj komencitaj verŝajne post la jaro 1727 de Sarmede-anoj por ĝin doni unuecan aspekton inda je la riĉa familio. Kiam Ludoviko Valvason aĉetis la palacon, fine Dekoka jarcento, komenciĝis nova stadio de laboroj, kiuj estis kompletigitaj en la jaro 1807. En ĉijare estis gasto la reĝo de Napolo Jozefo Bonaparte (Korte, Korsikio, 7 januaro 1768 - Florenco, 28 julio 1844). Estis dekoraciitaj la internoj de Johanbaptisto Canal (Kanal) (Venecio, 1 septembro 1745 - tie, 5 decembro 1825), aktiva en Venetio kaj Friulo, kaj Jozefo Borsato (Topo de Travesjo, Pordenono, 14 februaro 1771 - Venecio, 13 oktobro 1849), ankaŭ li aktiva en la sama zono, per tre bela ciklo de freskoj, dume inter la Deknaŭa kaj Dudeka jarcento baronoj Morpurgo, novaj proprietuloj, aldonis novajn modifojn pro loĝkaŭzoj.

En la jaro 1871 la domo estis cedita al bankisto Abrahamo Morpurgo (Gradiska de Isonzo, Goricio, 1815 - 1877), elstarulo de grava familio je hebrea origino. Abrahamo Morpurgo engaĝiĝis aktive okupinte oficojn el kiuj magistratano, membro de la Komerca kaj Artoj Ĉambro kaj fondinto de la Udine'a Banko, kies vicprezidanto li estis ĝis la forpaso.

Per la aĉeto de Morpurgo-anoj komenciĝas tria stadio de laboroj en la palaco pro novaj loĝeja necesoj (servoĉambroj, termosifonoj, lifto). Plie ili dekoraciigis kelkajn ĉambrojn kaj donis multan gravecon al la ĝardeno, beligante la vaskon per eleganta statuo el ŝtono reprezentante Nimfon, farita ĉe la fino de la Deknaŭa jarcento de la udina skulptisto Leonardo Liso (Ĝemona de Friulo, Udino, 11 februaro 1855 - Udino, 19 julio 1922) kaj aparte konata ĉar ĝi estis lokita en la fontano de la Regiona Ekspozicio de Udino en la jaro 1903. La amo al la arto de familio Morpurgo, kaj specife de la dumviva senatano de la Itala Regno Elio (Udino, 10 oktobro 1858 - Pollando, 29 marto 1944), estas atestita ankaŭ per la artaj kolektoj, la plej parto el ili pasis per legaco de heredantoj, sinjorino Elda Hofmann Morpurgo (1893 - 1987) kaj inĝeniero Henriko Morpurgo (Udino, 6 aŭgusto 1891 - tie, 5 februaro 1969), al la udinaj urbaj muzeoj.

Donacita al la Udine'a Komunumo en la jaro 1969, post la restaŭrado ĝi enhavas la "Galeriojn de la Projekto", kiuj ekspozicias la arkitekturajn kaj dezajnajn arkivojn je propraĵo de la Urbaj Muzeoj.

Karakterizi la nobelan loĝejon estas la arkitekturaj elementoj de la fasado kaj la monumenta portalo el ŝtono, surmetiĝita de serlia balkono. Plie estas rimarkinda la "trapasejo" (ponto el ligno, kiu kunigas du partojn de la domo, unika tipa ekzemplo por Udino) kaj de la alta subportiko kun laŭvida trabaro, kiu kondukas al la interna korto. Loĝio disigas la internan korton de la italastila ĝardeno. Supre la kvar duoncirklaĵoj arkoj subtenitaj per duoblaj kolonoj, la loĝio estas komponita el arkitrava kadro surmetiĝita de du balustradoj sur kiuj apogas ok alegoriaj prezentadoj de la "Kvar sezonoj" atribueblaj al iu Mattiussi "ŝtonhakisto" ĉirkaŭ la jaro 1782.

Ĉi tie oni konservas partojn el freskoj de Canaletto (Kanaletto), Johano Antono Canal (Venecio, 1697 - tie, 1768) devenintaj el alia palaco en strato Savorgnana, palaco Gallici - Strassoldo (Galliĉi), ruinigitaj dum bombado de la jaro 1945 kaj donacitaj al la Urbaj Muzeoj (sur la plafono de la ŝtuparego estas la "Vero" kaj la "Famo").

**92. - Palaco Gallici (Galiči) - Strassoldo, strato Savorgnana (Savornjana) n.ro 26.**



La palaco Strassoldo - Gallici, konstruigita de branĉo de la familio Manin dum la Deksepa jarcento, devas ĝian nunan aspekton al restaŭradoj faritaj post la dua mondmilito kaj post la tertremo de la jaro 1976. La freskoj de Johano Baptisto Canal, Canaletto (Kanal, Kanaletto) (Venecio, 1697 - tie, 1768), parte estis detruitaj kaj parte estis forigitaj kaj traslokigitaj al la Urbaj Muzeoj de Udino.



93. - Palaco Schiavi (Skiavi), strato Savorgnana (Savornjana) n.ro 28.



Angulo strato Rašedo



Angulo strato Gorgi



Eks sidejo de la Stabejo de la Brigado Infanteria "Mantuo" (jam Stabejo Divizio Infanteria "Mantuo"). Palaco projektita por adv. Schiavi (Skiavi) en la jaro 1912 de ark. Roĝero (Triesto, 20 septembro 1854 - tie, 22 oktobro 1920) kaj Arduino Berlam (Triesto, 20 julio 1880 - Triĉesjmo, Udino, 28 julio 1946), prestiĝa dinastio de triesta arkitektoj kun enradikiĝo en Triĉesjmo.

Komence ĝi estis destinita al butikoj ĉe la teretaĝo kaj rezidejo de la familio ĉe la supera etaĝo.

Dividiĝita je du etaĝoj, ĝi prezentas la enirejon en centra pozicio el kiu oni aliras la ejojn de la teretaĝo kaj la ŝtuparegon, kiu alportas al la unua etaĝo, dotita ankaŭ per dua helpa ŝtuparo, lokita dorse.

La fasado havas arkfenestrojn ĉe la teretaĝo kaj arkitravita ĉe la supera etaĝo.

Palaco Schiavi estas konata precipe ĉar ĝi loĝigis la "Mantuo"-n, de la dua post milito ĝis ĝia dissolvo okazita en la jaro 1997, kaj de la jaro 2001 la Brigadon Pioniro - kiu kunordigis la regimentojn fervojoj, fajroj kaj pioniroj – naskita el branĉo de la homonima Stabejo de la V Korpuso.

#### 94. - Palaco Susanna - Di Prampero, strato Stringher (Stringer) n.ro 5.



La palaco Susanna - Di Prampero estis konstruigita de Markvando Susanna duone de la XVI jarcento. Tiam reiras kelkaj arkitektonaj elementoj kiel la pordego, la triforo kaj la balkoneto angulforme. En la korteto estas videbla la "L"-loĝio kun arkoj malpliigitaj.

95. - Instituto Renati, jam Monaĥinejo de la Rozarie, strato Tomadini n.ro 13.



96. - Instituto Renati, jam Monaĥinejo de la Rozarie, strato Trento n.ro 4.



97. - Eks Seminario, Eks Palaco de la Tribunalalo, strato Treppo n.ro 4.



n.ro 2



n.ro 4



n.ro 6

Sidejo de la Konservatorio.

Ĝi estis konstruigita en la jaro 1597 de patriarko Francisko Barbaro (Venecio, 16 marto 1546 - tie, 6 aprilo 1616) por fari la unuan Seminarion de Udino.

Antaŭ la jaro 1722 ĝi estis pliigita de patriarko Dionisjo Delfino (Venecio, 1663 - Sankta Vito de Taljamento, Pordenono, 3 aŭgusto 1734) kaj ankaŭ de la unua ĉefepiskopo postsekvinta patriarkojn, Jan Hieronimo Gradenigo (Venecio, 19 februaro 1708 - Udino, 30 junio 1786), kiu ĝin pliigis de arkitekto Karlo Corbellini (Korbellini).

En la jaro 1734 Johanbaptisto Tiepolo (Venecio, 5 marto 1696 – Madrido, Hispanio, 27 marto 1770) pentris kvin tolojn por la Seminario kaj unu el tiuj, la Starigo de la statuo al iu imperiestro, estas gardita en la Oficoj de Florenco.

En la jaro 1765 la Seminario estis destinita ankaŭ al publika lernejo.

La palaco, poste (1797), estis okupita de la francaj soldatoj kaj, post la Kampoformjo-paco (17 oktobro 1797), de tiuj aŭstriaĵoj.

Ĉar la palaco iĝis por militara uzado, en la jaro 1811 la Seminario, dirita de sankta Bernardeto, estis translokita kien ĝi estas nune. Sed la konstruaĵo apude la preĝejo S. Berbardeto, tiel kiel ni ĝin vidas hodiaŭ, estis konstruigita inter la jaroj 1830 kaj 1834, de episkopo Emanuelo Lodi (Milano, 13 aŭgusto 1770 – Udino, 8 februaro 1845).

Antaŭ la Konservatorio, la palaco estis destinita al karceroj kaj kiam ili estis translokitaj al strato Spalato, en la jaro 1849 ĝi iĝis la sidejo de la Prefektejo kaj parto de Tribunallo.

**98. - Palazzo Della Porta - Masieri, strato Treppo n.ro 7.**



Sidejo de la Ĉefepiskoka Kurio.

En la jaro 1525 Hieronimo de Montegnacco (Montenjako) (Udino, 1507 - Kasako, Udino, 11 aprilo 1573) petis porcion da publika tereno aldoni al la propraĵo por konstrui domon. Ĉi tio estis cedita de grafo Jozefo la 18an de junio 1590, garantie de prunto je cent dukatoj, al Tomaso Della Porta (Porleca, Komo, 1550 - Romo, 24 novembro 1606), kondiĉe ĝin redoni post la estingo de la ŝuldo, kiu ne okazis.

Post kiam en la jaro 1597 per interŝanĝo Della Porta-anoj aĉetis alian domon apude tiu origina, en la jaro 1650 ĝi estis luigita kaj dum mallonga tempo tie loĝis ankaŭ monaĥinoj Dimesse, kiuj serĉis monakejon en la zono. La domo tamen estis elaĉetita de Della Porta-anoj en la jaro 1655. La palaco estis strukturita laŭ ĝiaj definitivaj formoj inter la jaroj 1655 kaj 1685.

D.ro Jozefo ne havis gefilojn. Do, li lasis, en la jaro 1706, la palacon herede al Markantono Stainero, adoptita, kondiĉe, ke li alprenu la nomon de Della Porta. Li konformiĝis, sed li ne multe honoris lin per sia

vivmaniero kiel aventurulo. Li estis murdigita per arkebuzpafo de Grafo Klaŭdo el Zucco (Zuko) dum li vespermanĝis.

Markantono lasante "kelkiom da filinoj" kaj du filojn, Jozefo kaj Vincento, lasis al ĉilastaj la palacon, kiuj dividis la propraĵon. Poste, inter la jaro 1744 kaj la jaro 1793, al la palaco oni faris beligajn laborojn.

La branĉo de Jozefo ne havis idojn kaj duono de la propraĵo estis donacita al malriĉuloj kaj al la paroko de la Gracoj. Tamen la idoj de Vincento, kiuj ne akceptis la donacon, faris procesion kaj en la jaro 1845 ili reakiris la propraĵon.

La domo, kiu havis ankaŭ grandan fruktokampon aligita, estis kiel ajn loĝita de luantoj de la jaro 1789. En la jaro 1851 tie havis sidejon privata lerneja instituto rekonita. Pasita herede al heredantoj, en la jaro 1932 ĝi estis vendita al inĝ. Paŭlo Masieri, kiu kunlaboris ankaŭ kun arkitekto Frank Lloyd Wright (Richland Center, 8 junio 1867 - Phoenix, 9 aprilo 1959).

Paŭlo Masieni kunigis la propraĵon en liaj manoj en la jaro 1937. En la jaro 1948 arkitekto Anĝelo Masieri (Villa Santina, Udino, 1921 – Bedford, Pennsylvania, Usono, 28 junio 1952), duenaskita filo de Paŭlo, lokis en la palaco lian studejon kaj poste ankaŭ lian loĝejon.

Dum la kvindekaj-sesdekaj jaroj de la Dudeka jarcento la konstruaĵo poste estis acetita de la Ĉefdiocezo por la oficejo de la Ĉefepiskopa Kurio.

Palaco Della Porta konsistas el tri etaĝoj altiĝitaj per mansardo je timpano. La fasado havas pordegon arkforme el boso surmetiĝita per serlia triforo ĉe la beletaĝo, ripetita minortone ĉe la supera etaĝo kaj ankoraŭ ĉe la timpano. La flankaj partoj havas en la tri etaĝoj fenestroparojn: tiuj de la teretaĝo estas beligitaj per elegantaj kradaĵoj, kiuj centre havas la nobelan blazonon. Kradaĵo nobligas ankaŭ la arkon de la enira pordego, tiel kiel tiu de la larĝa pordego el boso, kiu en la ŝlosila ŝtono gardas, skulptita, la blazonon de Della Porta.

Ene freskoj de Quaglio (Kvaljo) (Laino Valo de Intelvi, Komo, 1668 - tie, 3 julio 1751).

**99. - Domo Cavarzerani (Kavarzerani), strato Treppo n.ro 12.**



Konstruaĵo je tri etaĝoj konstruita en 1913 laŭ desegno de ark. Cezaro Miani (Udino, 22 aŭgusto 1891 – tie, 1961).

La fronto prezentas du enirejojn: uno centra en la fasado kaj unu en la mallonga flanko evidentigata de loĝio subtenita de maldikaj kolonoj kaj fermita supre de balustrado je kolonetoj el artefarita ŝtono.

La teretaĝo prezentas horizontalajn kaneladojn de la stukajo. La fenestroj estas regulaj kaj samliniigitaj, rekvadrigitaj de kornicoj el artefarta ŝtono.

Sur la fasado estas memorŝtono: DOMO KAVARZERANI – KONSTRUITA EN LA JARO 1913 – DE DOKTORO ANTONO KAVARZERANI – KIRURGO (1873 – 1966) – KIU ĈI TIE VIVIS KAJ FORPASIS. – KONSTANCIA KAVARZERANI – FILINO (1915 – 2006) POETINO.

**CAVARZERANI Antono** (Stevenà de Kaneva de Saçile, Pordenone, 24 majo 1873 - Udino, 20 majo 1966).

**CAVARZERANI Konstancia** (1915 - 2006).



100. - Palaco Gorgo - Maniago, strato Viola n.ro 3.





Palaco apartenita al grafo Olvrado de Maniago.

En la interna korto ĝi havas renesancan loĝion el la paladia arkitekturo kie havis sidejon, ekde la jaro 1606, la Akademio de Sventatoj, unu el la pli prestiĝaj kulturaj institucioj iĝita en la jaro 1756 Akademio pri Sciencoj, Literaturo kaj Artoj de Udino. Konstruita por grafoj Gorgo: la konstruaĵo, kiu gardas ŝatindajn freskojn kaj dekokjarcentajn stukaĵojn, estis restaŭrita en la XVIII jarcento de Luko Andrioli la Juna.

**101. - Domo Sabbadini - Cuoghi (Kuogi), strato Viktorio Veneto n.ro 12.**



La domo estis tute freskita de Joanbaptisto Canal (Kanal) (Venecio, 1 septembro 1745 - tie, 5 decembro 1825) kaj por la ornamoj de Jozefo Borsato (Toppo de Travesjo, Pordenone, 14 februaro 1771 - Venecio, 13 oktobro 1849). La salonego estas pentrita per scenoj el la Jerusalemo liberigita de Tasso (Sorrento, Napolo, 11 marto 1544 - Romo, 25 aprilo 1595). En la plafono de la salonego, Canal freskis Apolonon, kiu stiras sunĉaron, dume en la ĉambroj alternas elegantaj alegoriaj bildoj kun la groteskaj de Borsato, kiuj memorigas la dekoraciojn de palaco Valvason - Morpurgo.

102. - Palaco della Forza Concina (Končina), Strato Viktorio Veneto n.ro 18.



La palaco havas novklasikan fasadon. Konstruaĵo de Mikelo Zuliani, skandita de du ordoj de duonpilastroj.

103. - Palaco Strassoldo - Mantica (Mantjka), Strato Viktorio Veneto n.ro 20.





Sidejo de la Banko UniKredit.

Grafo Julio Antono Strassoldo en la jaro 1692 decidis beligi la domojn, ankoraŭ relative modestaj, kiujn lia familio (en la jaro 1557 Ludoviko de Strassoldo kaj en la jaro 1574 lia frato, kanoniko Johan Bapto) aĉetis de familio Franĝipane de Kastelo, kiuj ĉi tie loĝis ĝis la duono de la Deksesa jarcento. Do, li detruigis diversajn dometojn, reirante al la Dekkvara jarcento (en la jaro 1557 Ludoviko de Strassoldo kaj en la jaro 1574 lia frato, kanoniko Johan Baptisto), kaj konstruigi la nunan palacon.

La palaco estas konata laŭ la nomo Strassoldo - Mantica, sed sur la tabelo lokita apud la enirejo de UniKredit estas skribita Strassoldo - Manin. Fakte, la palaco estis loĝita de familio Strassoldo, Montico (Montiko), Mantica kaj Manin.

Sur la pavimo de la salonego freskita de Quaglio (Kvaljo) estas la blazono de familio Manin.

La palaco prezentas la fasadon ornamita per la ripeto de la motivo de la triforo ĉe la tri etaĝoj, pli riĉa en la beletaĝo kun duoncirklaĵoj arkaj ornamitaj de maskegoj kaj kun ne korbela balustrado. Per honora ŝtuparo freskita, oni eniras la centran salonegon kie estas gravaj freskoj (1692) de Julio Quaglio (Laino Valo de Intelvi, Komo, 1668 - tie, 3 julio 1751), pentristo je lia unua tasko, kiuj prezentas mitologiajn scenojn (la centra medaliono prezentante "La falon de gigantoj" estas sendube la artaĵo pli sukcesa) kaj alegoriajn temojn (en la centra fako de la plafono kaj en la ses medalionoj, kiuj ĝin ĉirkaŭas) kaj kelkajn historiajn epizodojn de la familio Strassoldo (sur la muroj).

Io sufiĉe nekutima, ni trovas la subskribon de la pentristo kune kun tiu de stukistoj Laŭrenco Mattia Retti (1692 - 1751) kaj Johano Baptisto Bareglio (Bareljo) (n. Ponna, Komo, 1692).

Dudek portretoj de Strassoldo-anoj, kondotieroj, togistoj, literaturistoj kaj religiuloj kompletigas la dekoracion de la salonego.

Du grandaj freskoj sur la muroj reprezentante Agono el Strassoldo antaŭ Niĉeforo kaj Rambaldo de Strassoldo, generalo de Valentiniano (Ravenna, 2 julio 419 - Romo, 16 marto 455) imperiestro kontraŭ Atilo (Kaŭkazio, 406 - Panonio, Hungario, 16 marto 453) en la jaro 448.

En la jaro 1782 la palaco estis aĉetita de grafoj Mantica, iĝante unu el iliaj akceptoloĝejoj. En la jaro 1954 ĝi estis aĉetita de la Friula Banko, iĝante la centra sidejo, kaj en la jaro 2003 de la Romanjola Kredito. Hodiaŭ, sekve de la diversaj societaj kunfandiĝoj, ĝi estas unu el la sidejoj de la Banko UniKredit.

**104. - Domo Lovaria - Asquini (Lovarja - Askvini), strato Viktorio Veneto n.ro 24.**



Tardogotika origino, la fenestroj de la unua etaĝo estas frukto de restaŭroj faritaj en la jaro 1820. Alian restaŭron ĝi havis en la jaro 1935 kaj en tiu okazo estis refarita la origina dekkvinjarcenta dekoracio kun pentraĵoj de Romano Bastianello, hodiaŭ preskaŭ forviŝigita. En la jaro 1854 ĉe la teretaĝo estis malfermita la apoteko "Alla Fenice risorta" (Ĉe la Fenikso) reviviĝita, pliriĉigita per valoraj lignaj meblaro de Antono Brusconi (Bruskoni) (Udino, 1851 – tie, 1928) kaj freskita de

Luizo Pletti (Udino, 1 februaro 1820 - tie, 11 majo 1889). La nuna insigno (1939) estas de Provino Valle (Udino, 10 marto 1877 - tie, 12 aŭgusto 1955). La interno estis renovigita en la jaro 1974 laŭ projekto de D. Bortolotti. Ĝi konservas skulptaĵon (1980) de Luciano Ceschia (Ĉeskja) (Kola de Tarĉento, Udino, 4 junio 1925 - Udino, 4 novembro 1991) prezentante Fenikson.

Domo Lovaria - Asquini havas arkon, kiu ĝin kunligas kun la domo Lovarja - Galanda. Tiu trapasejo oni devas al la fakto, ke en la jaro 1544, patriarko Marino Grimani (Venecio, 1488/1489 – Orvieto, Terni, 28 septembro 1546), esprimis la deziron malfermi aperturon tra la remparo de la tria murzono por mallongigi la straton inter la patriarka palaco kaj la ĉefpreĝejo. Nur en la jaro 1602 tamen oni ĝin povis realigi. La arko, kiu kunigas la du domojn estis konstruita en la jaro 1561 de la nobela familio Lovarja, proprieto de tiuj konstruaĵoj kaj donis la nomon al la strato.

Domo Lovaria - Asquini, konstruita en la XV jarcento, konservas tardagotikajn elementojn kiel la pintarkojn de la portiko kaj la balkoneton. Deksesjarcentaj estas la fenestroj de la superaj etaĝoj.

### 105. - Palaco Lovaria (Lovarja) - Galanda, strato Viktorio Veneto n.ro 26.



Ĉe la unua etaĝo unu el la ĉambroj estas dekoraciita per pejzaĝoj kaj alegoriaj bildoj deknaŭjarcentaj.

106. - Domo Tinghi (Tingi), strato Viktorio Veneto n.ro 38.





La palaco Tingi havas la nomon de familio siena origino, kiu enloĝiĝis ĉirkaŭ la jaro 1345 en Udino, en Kvartalo S. Maria Magdalena (nun strato Viktorio Veneto) kie ili praktikis ankaŭ la prunton.

Domo Tinghi-Tingi estas tio, kio plurestas de granda propraĵo, kiu etendiĝis de strato Viktorio Veneto ĝis la malantaŭa strato de la Prefektura: kun altaj konstruaĵoj, kortoj kaj ĝardenoj apartenis ĝis la fino de la Dekkvara jarcento al la siena familio.

Tinghi-anoj farigis la dekoracion de la fasado supre la arkaĵoj de la teretaĝo ĝis la tegmento al Johano Antono de Pordenono (Pordenono, 1483 ĉirkaŭ – Feraro, 14 januaro 1539), kiu prezentis scenojn pri la Gigantomakio kaj alegoriajn bildojn ene falsaj konkvoj, lokitaj inter fenestro kaj fenestro. Pro la atmosferaj kondiĉoj, en la tempo kelkaj partoj tute foriĝis, dume en la supera parto, antaŭ nelonge estis restaŭritaj de la Intendentejo pri Belarto kaj do ili estas ankoraŭ legeblaj.

Ĉirkaŭ la duono de la Deksepa jarcento, la domo estis vendita al Bianconi (Biankoni)-anoj, kiuj ĝin loĝis ĝis la jaro 1795 kiam ĝi pasis al la Komunumo, kiu serĉis konstruaĵon kie aranĝi bonan gastejon por enloĝigi precipe eksterlandanajn vojaĝantojn, kiuj alvenis de Vieno. Tiel ĝis la jaro 1812 domo Tinghi estis la sidejo de la gastejo “Alla Croce di Malta” (Ĉe la Kruco de Malto) kondukita de Antono Fanzutti.

En la jaro 1834 la konstruaĵo estis aĉetita de Jozefo Fabris kaj ĉe la fino de la Deknaŭa jarcento ĝi pasis denove al familio Campeis (Kampeis). Nun ĝi estas propraĵo de Luizo Folegotto kaj enhavas la antikvan “Pasticceria Carli” (Kukejon Karli), kies ĉambroj estas malfermataj al turistoj.

La freskoj kun diecoj kaj romanaj scenoj de domo Tinghi estis faritaj ĉirkaŭ la jaro 1532 de la friula Johano Antono el Pordenono, kaj ili estis certe unu el liaj junaj laboroj la plej peza kaj el la plej interesaj faritaj dum la tuta lia kariero, en Udino. Supre la arkaĵoj de la portiko estis pentrita la Tinghi-blazonon, kun apude la lupino kun Rumolo kaj Remo kaj kelkajn klasikemajn medalionojn.

Pasita al diversaj proprietoj, iĝita gastejo, poste destinita parte al butikoj kaj oficejoj el tiu, kiu estis la origina dekoracio nun restas sole la belega freto en ĉambreto de la beletaĝo, antaŭ nelonge restaŭrigita de la nuna proprietulo Luizo Folegotto, kiu de la jaro 1987 malfermis al la publiko la konstruaĵon. Vizitebla de ĉiuj, sed eble ankoraŭ tre malmulte konata, malgraŭ la turisma tabelo lokita ekstere la “Kukejo Karli”, kiu indikas klare kaj la eksterajn freskojn de Pordenone kaj tiujn internajn, la ĉambreto de la unua etaĝo estas do dekoraciita per alta freto, atribuita al Pomponjo Amalteo (Motta de Livenza, Treviso, 1505 - Sankta Vito de Taljamento, Pordenono, 9 marto 1588), bofilo kaj skolano de Pordenone.

107. - Pošta Palaco, strato Viktorio Veneto n.ro 42.



Flanko strato de la Prefektura



Portalo strato de la Prefektura n.ro 21 A

La konstruado de la nuna Poŝta kaj Telegrafa palaco komenciĝis en la jaro 1921 laŭ la projekto de Ĝino Tonizzo (Tónico) (1883 – 1929) kaj ĝi estis finita en la jaro 1926 en la areo antaŭe okupita ekde la jaro 1331, de la preĝejo S. Maria de la Hospitalo de la Plebo de Udino, nomita en la jaro 1340 S. Maria de la Udine'a Komunumo kaj, poste, S. Maria de la Mizerikordo kaj S. Maria Magdalena. En la jaro 1643 ĝi estis aĉetita de la Kongregacio de sankta Filipo Neri, el kiu devenis la nomo preĝejo de Filipanoj. Forlasita, ĝi estis disfalgita en la jaro 1921.

La palazo etendiĝas je tri etaĝoj kaj unu subtegmento destinitaj al giĉetoj por la publiko en la teretaĝo kaj al oficejoj en la superaj etaĝoj.

La palaco prezentas en la teretaĝo serion de arkfenestrojn kun rustika bosaro, fermitaj per kradaĵoj de Alberto Calligaris (Kalligaris) (Udino, 29 septembro 1880 - tie, 20 aprilo 1960).

En la unua etaĝo estas monoforoj, kaj triforoj subdividitaj per kolonetoj en la dua etaĝo.

La subtegmenta strio estas dekoraciita per freto, laboro de Henriko Miani (Udino, 1889 – tie, 1933).

La ĉefa enirejo prezentas rustikan bosaron laŭ la tuta alteco de la palaco kaj triforojn altiĝitaj per angulaj timpanoj kaj lunetoj kies la centra estas grafitdekoraciita.

En la atrio du memorŝtonoj memorigas la falintojn pro la milito kaj tiujn pro la tertremo de la jaro 1976.

DE ĈI TIE – ĜIS KIAM ESTU GLORO AL LA HOMOJ – LA HOLOKAŬSTON AL LA PATRIO – BRILOS VIAJ NOMOJ – HO DE LABORA KAJ FIDA KAMARADOJ – DUM LA SANKTA MILITO – SERENAJ FALINATJ – Sekvas 9 nomoj – POŝTISTOJ – DE LA FRIULA PROVINCO – SUN LA AŬSPICIOJ DE LA NACIA REGISTARO – JE ĈIAMDAŬRA MEMORO – FIERE – SURMETIS – 1926.

LA POŝTISTA ADMINISTRACIO – JE LA TRIA DATREVENO DE LA TERTREMO, KIU KRUDE TRAFIS – FRIULON – ESPRIMANTE DANKEMON AL LA LOKAJ POŝTISTOJ – KAJ AL ĈIUJ LA ALIAJ, KIUJ ALKURIS EL ĈIUJ ITALAJ URBOJ – KLOPODIS JE OFERO KAJ EGE LAŬDINDA – SOLIDARA HOMA SPIRITO POR RESTARIGI – LA POŝTAJN KAJ TELEKOMUNIKAJN SERVOJN – MEMORAS – KORTUŜITA LA PROPAN PERSONARON TROFRUE FORPASINTA – EN ĜEMONA LA TRAGIKAN NOKTON DE LA 6 MAJO 1976. Sekvas 4 nomoj – UDINO 6 MAJO.

**108. - Palaco Beretta, strato Viktorio Veneto n.ro 45.**



Iam proprajŝo de la nobela Jozefo Gallici (Galliĉi).

La palaco estis sidejo de la Societo de la Unio, starigita en Udino laŭ modelo je simila torina iniciato, kiel kunvenejo por la bona mondo. Ĝiaj viglaj dancofestoj estis memorindaj okazaĵoj en la udine'a vivo.

109. - Jam palaco Orgnani (Ornjani) - Martina, strato Zanon n.ro 1.



**110. - Palaco Camavitto (Kamavito), strato Zanon n.ro 4, angulo strato Muratti.**



La marmora bareliefo

La konstruaĵo okupas la angulon inter la stratoj Zanon kaj Muratti kie, ĝis la jaro 1932, estis la preĝejo S. Nikolao, detruita post la translokiĝo della sidejo de la homonima paroko en la preĝejon de la Osteja Templo. Marmora bareliefo farita de Johano Napoleono Pellis (Ĉikoniko de Faganja, Udino, 19 februaro 1888 – Valbruna, Malborgeto, Udino, 6 februaro 1963), memorigas la lokon: S. Nikolao benanta, kiu tenas la etmodelo de la preĝejo, kies historio estas sintezita per la du datoj skribitaj: 1328 kaj 1933.

Ĝi konsistas el kvar etaĝoj, komence destinitaj al komercaj aktivecoj ĉe la teretaĝo kaj rezida ĉe la superaj etaĝoj.

La konstruaĵo estas enfazita per facila malantaŭeniĝo de la fasadoj, al kiu respondas, ĉe ĉiu etaĝo, terasoj el ferbetono.

Ĉe la teretaĝo la fasadoj estas tegitaj per marmoraj platoj; ĉe la superaj etaĝoj la tegaĵo estas el stuko.

**111. - Palaco Politi - Camavitto (Kamavito), strato Zanon n.ro 6.**



Palaco apartenita al Ugo Camavitto.

La palaco estas lokita kie la 6an de novembro 1341 patriarko Bertrando (Sankta Ĝenies, Francio, 1280 ĉirkaŭ - Sankta Georgo de la Rikinvelda, Pordenon0, 6 junio 1350) fondis monaĥinejon de Pentofaraj Aŭgustenanoj. La konstruaĵo estis konstruita en la apudeco de la preĝejo S. Nikolao lokita ĉe la angulo inter strato Zanon kaj strato Muratti jam antaŭe la jaro 1328.

En la jaro 1773 la monaĥinejo estis vendita al Johano Antono Politi kaj al la filo Jakobo, lignakomercistoj deveninte el Klaŭzetto. Dum tiu periodo la funkcia kaj distribua kunesto inter la preĝejo kaj la domo kreis malakordojn inter la familio kaj la paroĥa komunumo: Politi-anoj povis trapasi pordon en la supera ĥorejo de la preĝejo supre la pordo. Ne tolerante paroĥanojn, ili, nokte, detruis tiun ĥorejon kaj masonis la pordon. Pro tio naskiĝis kverelo.

Tial, iĝis necesa de Politi-anoj alporti modifojn al la masonaĵparto de ilia propraĵo.

Ĉe la fino de la XVIII jarcento estas taskita arkitekto-ĉefmasonisto Luko Andrioli redakti la projekton, kiu proponas al ni la palacon preskaŭ en la hodiaŭa vestoj.

La 20an de marto 1855 Odoriko Politi (Udino, 27 januaro 1785 – Venecio, 18 oktobro 1846), filo de Johano Antono, prezentas reformprojekton de la domo, kiu antaŭvidas la altigon de unu etaĝo kaj la radikalan transformon de la fasado. La projekto ne estis kondukita al ĝia fino.

La palaco apudestas la konvento de la Zitelle (Maljunaj fraŭlinoj). La palaco etendiĝas laŭ tri etaĝoj kaj montras la ĉefan fasadon skandita per serio de rektangulaj fenestroj kun ĉe la teretaĝo soklo je simpla bosoj. La ĉefa enirejo havas lintelan portalon sur kiu estas arkfenestro kun balustrado.

Estas gravaj freskoj de Odoriko Politi faritaj plurfoje inter la jaroj 1815 kaj 1818 kaj stukaĵoj kun ornamaj motivoj de Jozefo kaj Santo Zuccolo (Zukkolo).

Kiam en la jaro 1819 Odoriko Politi transloĝiĝis al Venecio, la palaco pasis al Colloredo (Koloredanoj) (1842), poste al la familio Luzzato (Lucato) kaj fine aĉetita en la jaro 1912 de Camavitto-anoj.

La lasta loĝanto, antaŭ la aĉeto en la jaro 1983 de la Udine'a Universitato (Matematiko, Informadiko kaj Sistemiko), estis pentristo Georgo Celiberti (Ĉeliberti) (n. Udino, 19 novembro 1929), kiu tie loĝis de la jaro 1968 ĝis la jaro 1981.

En la unuaj monatoj de la jaro 1994 la Fako pri Matematiko kaj Informadiko estis translokita ene la novan Universitatan Centron en la periferia kvartalo Rizzi-Ricci.

Ĝi estas la naskiĝa domo de la fama pentristo Odoriko Politi, kies freskoj estas ankoraŭ videblaj en la plafono de la salonego.

Pri la preĝejo S. Nikolao, post pliigo farita en la jaro 1873, ĝi estis malfermita al la kulto en la jaro 1932 kaj detruita en la jaro 1933.



**112. - Palaco Brazzà (Bracà), strato Zanon n.ro 16.**



Historie ĝi apartenis al familio el Brazzà-Bracca.

Jam ĉe la komenco de la XVI jarcento la konstruaĵo ekzistis en Kvartalo Sankta Maria kaj apartenis al familio Colloredo (Kollaredo). En la jaro 1783 la konstruaĵo pasis al grafo Francisko Savorgnan di Brazzà (Savornjan de Bracà). Ĝi estas la naskiĝa domo de grafo Askanjo Savorgnan el Brazzà (Udino, 1793 – Romo, 1877), fama artisto kaj patro de Petro (Kastel Gandolfo, Romo, 26 januaro 1852 - Dakar, Senegalo, 14 septembro 1905), deka el liaj dek tri gefiloj, esploristo en Gabono kaj Kongo, al kiu estas dediĉita la nomo de la urbo Bracaville kaj starigita maŭzoleo je lia honoro ĉiam en la konga ĉefurbo. Poste tie loĝis la politika ĵurnalisto Paĉifjko Valussi (Talmassons, Udino, 30 novembro 1813 - Udino, 28 aŭgusto 1893) kaj, antaŭ ne longe Azzo Varisco (Aco Varisko) (Milano, 1884 – Udino, 1971), eminenta ĉefkuracisto.

La palaco sekvas la skemon de la urbaj palacoj friulaj, tre influitaj de la venecia arkitekturo. Ankaŭ ĉi tie granda atrio ĉe la teretaĝo al kiu oni aliras per pordego kun supre arkbalkono kun balustrado, kiu indikas la honoran salonegon.

Flanke aranĝiĝas tri etaĝoj de rektangulaj fenestroj beligitaj per kadroj el ŝtono, timpanoj kaj konveksaj kradaĵoj. Ĉe la superaj etaĝoj oni aliras per la subportiko. La ŝtuparego estas monumenta kun balustrado el fero kaj ligno subtenita per ionikaj kolonoj kaj pilastroj surmetiĝitaj de fruktokorboj. La muroj kaj la surfacoj estas freskitaj.

La fresko, kiu prezentas la “Falon de Fetonto” estis atribuita longtempe al Johanbaptisto Canal (Kanal) (Venecio, 1 septembro 1745 - tie, 5 decembro 1825), sed freŝaj studoj, ĉe la lumo ankaŭ de la dokumentado, kiun oni trovis, interkonsentas vidi anstataŭ la manon de Andreo Urbani (Venecio, 23 aŭgusto 1711 - Padova, 24 junio 1798), kiu laboris post la jaro 1785.

**113. - Palaco Lovaria (Lovarja), strato Zanon n.ro 18.**



La nuna aspekto de la palaco reiras post la jaro 1723, kiam ĝi estis aĉetita de Tartagna (Tartanja)-anoj, familio origina el Orta ĉe Novaro, kiu komercis per teksaĵoj.

En la jaro 1646 Tartagna-anoj aĉetis de Venecio la jurisdikcion de Leonacco (Leonako) kaj en la jaro 1699 ili eniris esti parto de la udina nobelaro. Adekvata loĝejo al nova rango iĝis tial necesa por la indeco kaj la prestiĝo de la familio.

La dekoracioj de la palaco reiras al la Deknaŭa jarcento, kiam la konstruaĵo, sekve de la geedziĝo en la jaro 1822 de Verdelaŭra Tartagna kun Antono Lovaria, pasis al Lovaria-anoj. Ĉe la beletaĝo la centra salonego estis freskita de Dominico Paghini (Pagini) (Venecio, 1 julio 1777 - Udino, 28 marto 1850), ĉirkaŭ la jaro 1825 kune kun la loĝieto, kiu frontas al la korto.

**114. - Palazzo Clabassi - Sbruglio (Klabasi - Sbruljo), strato Zanon n.ro 22.**



Sidejo de la Intendantejo pri Media, Arkitekturaj, Artaj kaj Historiaj Havaĵoj.

La komplekso, nomita palaco Clabassi (origine Masieri) el la nomo de la lasta proprietulo, konsistas el la centra korpo je du etaĝoj kun interetaĝo kaj el konstruaĵoj, kiuj limigas la internan korton, kie estas lokitaj la oficejoj kaj la restaŭrada laboratorio de la Intendantejo.

La fasado, skandita per kornicoj el ŝtono je basaj kvadroŝtonoj, prezentas elegantan pordegon superstarita de la balkono kaj de granda triforo kun balkono, kiu donas lumon al la salonego.

La areo estis aĉetita en la jaro 1588 de la nobela Francisko Masieri kaj portita kiel doton de la filino Lavinja al grafo Hieronimo Sbruglio en la jaro 1602.

En la jaro 1762 la palaco estis aĉetita de grafo Jakobo Caimo (Kajmo), kiu en tiu okazo renovigis la ornaman veston de la internoj per elegantaj stukaĵoj kaj marmoraj muroj.

En la jaro 1809 la palaco iĝis propraĵo de Gaetano Clabassi, kiu ĝin posedis ĝis la jaro 1814, jaro de lia forpaso. Poste la komplekso estis ŝtatbienarita kaj loĝigis diversajn publikajn oficejojn ĝis la tertremo de la jaro 1976. En la jaro 1983 ĉe la fino de restaŭradoj faritaj post la tertremo, ĝi iĝis sidejo de la deigita oficejo de la Intendantejo de Friulo-Julia Venetio.

**115. - Domo Veritti, aleo Duodo n.ro 48.**



Ĝi estis projektita de arkitekto Karlo Scarpa (Skarpa) (Venecio, 2 junio 1906 - Sendai, Japanio, 28 novembro 1978). En la jaro advokato Luciano Veritti konfidis al Scarpa, konata en la jaro 1951 pere de lia kuzo Anĝelo Masieri (Villa Santina, Udino, 1921 - Bedford, Pensilvanio, Usono, 28 junio 1952), la projekton por lia familia rezidejo, realigi sur area kunligita per privata strato kun aleo Duodo. La konstruaĵo konsistas el kvar etaĝoj (subetaĝo, alta teretaĝo, unua etaĝo kaj atiko) kunligitaj per helkforma ŝtuparo.

La norda flanko estas fermita per kurba muro el ferbetono, dume tiu sude estas plejparte vitra. Ĉe la unua etaĝo estas lokita la ĉambroj de la komisiantoj, de ilia filoj kaj de la servistaro. La strukturo de la loĝejo konsistas el dek tri pilastroj je triangula plano; en la interna kavoj estas enmetitaj la tubaro de la instaladoj.

**116. - Domo Fischetto (Fisketo), aleo Volontuloj de la Libero n. 14, angulo strato Pordenono n.ro 1.**



Strato Pordenone n.ro 1



Strato Pordenone n.ro 15

Projektita en la jaro 1928 de Cezaro Scoccimarro-Skočimaro (Udino, 9 decembro 1897 – Romo, 29 majo 1953), domo Fischetto-Fisketo etendiĝas laŭ simetriaj aloj kun la centra parto kurba kaj pli alta ol la restanta masonaĵparto. La palaco je tri etaĝoj havas 4 apartamentojn, kaj en la teretaĝo butikon kun aligita vindepono, kiel indikata de la skribo sur la enira pordeto. La teretaĝo origine estis magazeno (pogranda vinvendejo). La proprietulo, Johano Fischetto, apulia origino, proprietulo de vitejo en Apulio, pogranda vinkomercisto, dum la Tridekaj jaroj realigis la familian domon (Domo Fischetto, ĝuste) en strato Pordenono n.ro 1. Hodiaŭ la teretaĝo estas transformita en butikojn.

**117. - Domo D'Arcano (D'Arkano), strateto D'Arcano n.ro 1.**



**118. - Palaco Gallici (Galiçi) - Strassoldo, strateto Di Prampero n.ro 13 B.**



**119. - Palaco Cassini - Camucio (Kasini - Kamucjo), placeto Cappuccini (Kapuĉini) n.ro 8.**



**120. - Palaco Torriani - Manin, placeto Karlo Melzi n.ro 2.**



Sidejo de la Udine'a Konfindustrio (Asocio de Industriistoj de la Udine'a Provinco).

La palaco, volita en la XVI jarcento de Francisko Masieri, estis je minoraj dimensioj kompare al la nuna. En la jaro 1630 ĝi estis vendita al grafo Ludoviko Manin, kiu ĝin pliiĝis. Dum la postaj jaroj estis konstruitaj la ĉevalejoj, la ekzedro kaj la apuda kapelo. En la jaro 1650 la komplekso estis kunligita kun la turo S. Maria per alta zonmuro kaj en la jaro 1768 ĝi iĝis propraĵo de Torri-anoj. La fasado havas bosportalon elstarita de triforo.

Trairita la eniran pordegon, oni trovas atrion kun trabaro ĉe la plafono, kolonetojn el ligno kaj kvar dekokjarcentajn benkojn ĉe la muroj. En la salonoj estas deknaŭjarcentaj dekoracioj.

En la korto estas lokita la ekzedro karakterizata, en ĝia centra flanko, de du kolonoj je striitaj busoj tenantaj dorikan entablementon kun freto de metopoj, triglifoj kaj dediĉa tabelo.

Sed la ĉefa lertaĵo de la komplekso estas la dekokjarcenta preĝejo de la Naskiĝo de Maria apud la palaco. Honore al ĝiaj konstruistoj, de la Udine-anoj ĝis nun ĝi estas nomita kapelo Manin.

121. - Palaco Torriani, placeto Karlo Melzi n.ro 4a.





**122. - Palaco de la Malnova Hospitalo, placeto Malnova Hospitalo n.ro 1.**



**Sidejo de la Justicpalaco.**

La konstruado de la antikva Hospitalo komenciĝis en la jaro 1782 laŭ la projekto de arkitekto Petro Bianchi-Bianki. Post interrompo la laboroj rekomenciĝis en la jaro 1794. La memorŝtono enmasonita sub la portiko memorigas la reordigo de la nova konstruaĵo en la jaro 1794.

Sekve de la "granda demografia pligo de la loĝantaro, la hospitalaj konstruaĵoj iĝis neadekvataj. La malnova instituto iĝis nesufiĉa; kun la kontribuo de ĉefepiskopo Hieromino Gradenigo (Venecio, 19 februaro 1708 – Udino, 30 junio 1786), oni plenumis interŝanĝon per kiu la konventualoj de S. Francisko, leĝaj proprietuloj de la konvento, transloĝiĝis al la klostro de Karmelanoj en strato Akvileja. La restaŭradaj laboroj daŭris pli ol dek jarojn pro la rimedmanko. En la jaro 1793 la konstruaĵo ne estis ankoraŭ konkludita kaj ĝi ne estus finita se la venetia Senato ne kontribuis per la enkasigo de takso po unu groŝo por bokalo da vino vendebla en urbo".

La alveno en la urbo de la francaj soldatoj portis al la transformo de la hospitalo, ne ankoraŭ finata, en kazermon. De la jaro 1806 ĝis la jaro 1813 ĝi iĝis milita hospitalo. Dum la Deknaŭa jarcento la konstruaĵo etendiĝis laŭ la tuta orienta flanko de la strato enhavante la tutan blokon. La plano, kun kvar kortoj, inspiro iĝis el la projekto por la Majora Hospitalo de Milano laboro de Filarete. Novaj modifoj estis faritaj dum la Daknaŭa

jarcento de arkitekto Jozefo Segusini (Feltre, Belluno, 15 julio 1801 – Belluno, 29 marto 1876) kaj de Petro Bianchi (Bianki) (Lugano, Svisio, 26 marto 1787 - Napolo, 28 decembro 1849).

Memorŝtono: AEDES NOSOCOMII - SVB AVSPICIIS - IO HIERONVMI GRADONICI - ARCHIEPISCOPI VTINENSIS - ANNO MDCCLXXXII ERIGI COEPTAS - ET CORROGATIS VNDIQVE - COLLATISQVE DE SVO PECVNIIS - AD MAGNAM PARTEM ALTITVDINIS PROVECTAS - PAVLLVS ANTONIVS ERICIVS - PROVINCIAE FOROIVL PRAESES - TANTI AVVNCVLI STVDIA PROCECVTVS - IMPETRATO A VENETO SENATV AD PLVRES ANNOS - AVCTARIO VECTIGALIS VINARII - AD SVPREMVM FASTIGIVM PERDVCENDAS CVRAVIT - VII VIRI GRATI ANIMI MON P.P. - ANNO R. S. MDCCLXXXIV (La hospitalan konstruaĵon sub Johano Hieronimo Gradenigo aŭspicioj ĉefepiskopo de Udino 1782 per la kvesto de ĉie, alvenita preskaŭ al la kulmino Paŭlo Antono Eriĉjo prezidanto de la friula provinco daŭrigita per multe da zorgo sub la veneta senato aŭspicioj dum diversaj jaroj okupita pro la vina imposto li okupiĝis ĝin kondukis al plenumiĝo, sep sinjoroj animdankaj surmetis, en la jaro de la spirita kompenso 1794).

**123. - Palazzo Piussi - Levi**, placo de la Respubliko n.ro 3/4 angulo, strato Teobaldo Ciconi (Ĉikoni).



Konata ankaŭ kiel palaco el vitro. Konstruita inter la jaroj 1933 kaj 1936, kiel lua nemoveblaĵo, ĝi estas eble la konstruaĵo pli signifa de la friula arkitekto Hermeso Midena (Sankta Danielo de Friulo, Udino, 12 septembro 1895 - Udino, 19 oktobro 1972).

La konstruaĵo konsistas el alta teretaĝo kaj aliaj kvar etaĝoj. La konstruaĵo etendiĝas kiel samlinia korpo laŭlonge de la perimetro de la triangula parcelo, formi specon de korto. La volumeno rigore simpla de la centra parto kaj la du volumenoj kurbaj de la aloj artikas vidaĵon, kiu malfermiĝas desegni la fonon de la placo.

La konstruaĵo estis submetita al monumenta kondiĉo en la jaro 1988 fare de la Intendantejo pri Media, Arkitekturaj, Artaj Historiaj Havaĵoj de Friulo-Julia Venetio.

124. - **Palaco Di Prampero**, placo Ĉefpreĝejo n.ro 6.



Sur la fasado estas la memorŝtono: ĈI TIE NASKIĜIS – ANTONETO DI PRAMPERO – KIU PER FIRMA FIDO – AL LA MALGRANDA PATRIO KAJ AL LA GRANDA – LA BRAKON LA SCIADON LA KONSILON – LA TUTAN NOBELEGAN VIVON – LI DEDIĈIS, - DEPUTITO KAJ URBESTRO DE UDINO – PREZIDANTO DE LA PROVINCA ASEMBLEO – SENATANO DE LA REĜOLANDO – Naskita 1836 Mortinta 1920 – AL LA RESPEKTITA URBANO – FRIULANOJ

**DI PRAMPERO Antoneto** (Udino, 1 aprilo 1836 - Romo, 27 decembro 1920), urba administranto, erudito, historiisto, liberala konservativa deputito por Udino 1866-1867, senatano de la reĝolando de 1890. Patrioto, sekretaj asociano. En 1919 li estis Vicprezidanto de Senato. Li verkis pri historio kaj pri friulaj institucioj, pri historia statistiko. En 1882 li eldonis en Venecio *Eseon pri geografia glosaro friula de la Vla ĝis la XIII jarcento*. Li estas en la Ilustrado de la Udine'a Komunumo, unua volumo de la Gvidlibro pri Friulo, eldonita en Udino en 1886.

**125. - Palazzo Mangilli (Manĝili) - Del Torso, placo Garibaldi n.ro 18/19.**



Sidejo de la Internacia Centro pri Mekanikaj Sciencoj (C.I.S.M.).

La palaco situas flanke de la naskiĝa domo de pentristo Johano Ricamatore (Rikamatore) dirita Johano de Udino (Udino, 27 oktobro 1487 – Romo, julio 1561).

Konstruigita de Danielo Antonini en la jaro 1577, ĝi estis vendita al Johano Baptisto Mangilli.

En la jaro 1924 la palaco estis aĉetita de grafo Aleksandro Del Torso (Udino, 1883 - tie, 1967), kiu ĝin transformis igante ĝin unu el la plej belaj konstruaĵoj en Udino. Ĝi havas agrablan fasadon kun du eniraj pordegoj, fenestrojn kun kurbaj kradaĵoj, triforojn kun balkonoj. Supre la centra triforo estas du statuoj surmetiĝitaj de nobela blazono.

Ene estas monumenta ŝtuparego kun la volbo dekoraciita per belega pentraĵo. Ĉe la superaj etaĝoj estas multenombraj ĉambroj, kiuj distingiĝas per la eleganteco de la ornamoj, kun pentraĵoj (inkluzivitaj la bildoj de grafoj Del Torso), freskoj (kun la bildoj de nobelaj Mangilli), stukaĵoj, dekoracioj, dekokajarcentaj meblaro.

En la interna korteto estas tri romanaj statuoj deveninte el Akvilejo, unu gotika puterando, unu baroka fontaneto, skribaĵo de la jaro 1577 kun la nomo de la unua proprietulo Danielo Andreo Antonini. En la ĝardeno estas ankaŭ ĉarma klostro kaj aliaj du statuoj el marmoro prezentante filozofojn Demokrito-n (Abdera, Grekio, 460 a.K. - 370 a.K. ĉirkaŭ) kaj Heraklito-n (Efeso, Turkio, 535 a.K. - tie, 475 a.K.), de Luizo Minisini (Sankta Danielo de Friulo, Udino, 1816 – Ronki de Kampanile de Villafranka Padovana, 6 septembro 1901).

La nobela Del Torso distingiĝis ankaŭ pro la memorindaj dancofestoj, kiujn li tenis en lia palaco en bela ĉambro kun la plafono freskita de Dominico Fabris (Osoppo, Udino, 11 novembro 1814 - tie, 29 oktobro 1901).

Palaco Manĝili - Del Torso estis sidejo en la Deksepa jarcento de la Udine'a Akademio de Sventatoj, antaŭa de la Akademio pri Sciencoj kaj Literaturo, kiu hodiaŭ en ĉi tiu konstruaĵo kunvenas. De la jaro 1968 ĝi estas propraĵo de la Udine'a Komunumo, kiu ĝin destinis al sidejo de la prestiĝa Centre International des Sciences Mécaniques (C.I.S.M.), organizo sen profita celo starigita de kelkaj eŭropaj scienculoj por subteni la ŝanĝon kaj la aplikon de la konoj pri avanaĵoj en la mekanikaj sciencoj kaj aliaj fakoj de la matematiko aplikata al la teorio de la informado, de la operacia esploro al la artefarita inteligento. Ene artaĵoj de Andreo Urbani (Venecio, 23 aŭgusto 1711 - Padovo, 24 junio 1798).

El ĝia balkono Jozefo Garibaldi (Nico, Francio, 4 julio 1897 – Insulo Kaprera, Sardinio, 2 junio 1882) la 1an de marto 1867 parolis al Udine-anoj.

Poste la placo (antaŭe de Barnabanoj) estis dediĉita al la heroo de la du mondoj kaj estis lokita statuo vidalvide la palaco.

Sur la fasado estas la memorŝtono: AL LA KRUDA ANONCO – GARIBALDI FORPASIS – LA UDINE'A POPOLO – EN LA SAKRA KONKORDO DE LA PLORO – SKRIBAS NEFORVIŝEBLE – LA 1an de MARTO 1867 – KIAM – DE ĈI TIU KONSTRUAĴO – LI PAROLIS PRI PATRIO KAJ PRI GLORO – LA TRE GRANDA HEROO – 8 JUNIO 1882

**126. - Domo Malignani (Malinjani), placo Libereco n.ro 2.**



La konstruaĵo fermas la angulon inter la supreniro al kastelo kaj strato Sottomonte, lokiĝante sur dekliva tereno de la kastelmonteto. La konstruaĵoj atribuitaj al la konstruentrepreno D'Aronco (D'Aronko): Hironimo (Ĝemona de Friulo, Udino, 31 aŭgusto 1825 - Udino, 29 junio 1909) kaj Jobapto, enhavas ankaŭ: la turegon Malignani, uzita de Arturo Malignani (Udino, 4 marto 1865 - tie, 15 februaro 1939) por meteologiaj kaj sciencaj eksperimentoj. La konstruaĵo estas kovrita per ebena tegmento dekoraciita per balustrado el forĝita fero kaj enmetita en specon de terasĝardeno. La fasado al la kastelsupreniro estas dekoraciita per elementoj el arta ŝtono, la bifora fenestro prezentas florajn dekoraciojn. Karakterizoj de la konstruentrepreno D'Aronco estas la uzado de la ĉarma ina kapo supre la kradaĵo kaj la galbita kadro de la enira pordego. La kradaĵo estas atribuebla al Virgilio D'Aronco; ŝatinda la kradaĵo lokita sube la biforo kun dekoraciitaj elementoj laŭ la skolo de Mackintosh. La forĝitaj feroj estas artaĵoj de Alberto Calligaris (Kalligaris) (Udino, 29 septembro 1880 – tie, 20 aprilo 1960). En la jaro 1950 arkitekto Petro Zanini (Udino, 1895 - tie, 6 majo 1990) realigis sistemigon de la internaj konstruaĵoj.

**127. - Palaco Bartolini, placo Marconi (Markoni) n.ro 8.**



Sidejo de la Urba Biblioteko "Vincento Joppi".

La palaco jam propraĵo de familio Andriotti, unu el la plej antikvaj en Udino. En la jaro 1373 fratoj Vikardo kaj Leonardo Andriotti ricevis de patriarko Markvando de Randek (Aŭgusta, Bavario, Germanio, 1296 - Triesto, 3 januaro 1381) loĝejon lokita sub la kastelmonteto, la apudajn domojn kaj parton el la monteto mem, kun malantaŭaj legomĝardenoj kaj vitejo, kiuj atingas ĝis la nuna strato Portanova.

Ĉirkaŭ la duono de la Deksepa jarcento familio Bartolini, post kiam aĉetis la Domon Andriotti, ili ĝin pliigis per la disfaligo de malnovaj konstruaĵoj apudaj kaj la 5an de marto 1641 ili startigis la konstruadon, taskita al majstromasonisto Petro Antono Navarra, de la palaco kun la monumenta fasado, kunligita kun tiu pli antikva.

En la jaro 1856 grafino Tereza Dragoni vidvino Bartolini (1772 – Udino, 2 novembro 1856) donacis al la Udine'a Komunumo la palacon kaj la apudan domon (eks Andriotti) kun la deziro, ke ili estos destinitaj al kelka "patruja uzado". Post kiam estis finitaj la restaŭradaj laboroj, en la novaj ejoj estis lokitaj la superaj inaj elementaj lernejoj, kiuj, du jarojn poste, estis translokitaj aliloken ebligante tiele inaŭguri la Urban Bibliotekon la 13an de majo 1866.

La enira pordego de la palaco, kun rondarko, estas flankita de du duonkolonoj kaj de dorikaj duonpilastroj kaj ĝi estas surmetiĝita de klasikimita entablemento kaj de korbela balkono. La beletaĝo prezentas, en la centra flanko, larĝan fenestron flankita de ionikaj duopaj kolonoj kun entablemento, kiu subtenas rondarkon.

Palaco Bartolini ene ne havas tre rimarkindajn artaĵojn, escepte de ĉambro, kiu konservas plafonon freskita de Johanbaptisto Canal (Kanal) (Venecio, 1 septembro 1745 - tie, 5 decembro 1825). Dume la fasado estas vere monumenta, kun supre tronante la blazono de familio Antonini.

En la enirkoridoro estas:

- bustoj: tiu al Danto Alighieri (Florenco, inter 14 majo kaj 13 junio 1265 - Ravenna, 13/14 septembro 1321), al dramverkisto Teobaldo Ciconi (Ĉikoni) (Sankta Danielo de Friulo, Udino, 28 decembro 1824 - Milano, 28 aprilo 1863) kaj al arkitekto Valentino Presani (Udino, 18 aprilo 1788 - tie, 18 aprilo 1861), faritaj de Luizo Minisini (Sankta Danielo de Friulo, Udino, 1816 – Ronki de Kampanile de Villafranka Padovana, 6 septembro 1901); al kanoniko Francisko Tomadini (Udino, 13 decembro 1782 - tie, 30 decembro 1862) kaj al ĵurnalisto Paĉifjko Valussi (Talmassons, Udino, 30 novembro 1813 - Udino, 28 aŭgusto 1893), faritaj de Andreo Flaibani (Udino, 15 novembro 1846 - tie, 19 februaro 1897); al pentristo Odoriko Politi (Udino, 29 januaro 1785 - Venecio, 18 oktobro 1846) kaj al poeto Petro Zorutti (Loncano de Nobela, Dolenja de Kolljo, Goricio, 27 decembro 1792 - Udino, 23 februaro 1867), faritaj de Antono Marignani (Marinjani); al juristo Paŭlo Canciani (Kanĉani) (Udino, 1725 – tie, 1810), farita de Vincenzo Luccardi (Lukardi) (Ĝemona de Friulo, Udino, 23 februaro 1811 - Ĝenacano, Romo, 14 novembro 1876); al poeto Petro Bonini (Palmanova, Udino, 14 majo 1844 - Udino, 22 februaro 1905), al pentristo Johano Darif (Venecio, 7 septembro 1801 - Milano, 2 decembro 1870);

- memorŝtono kun medaliono al verkisto Ĥino Ermacora-Ermakora (Madono de Aprato, Tarĉento, Udino, 30 aŭgusto 1894 - Udino, 25 aprilo 1957);

- du memorŝtonoj:

. TEREZA DRAGONI-BARTOLINI – POR HELPO AL JUNAJ UDINE-ANOJ – RIĈAJ JE TALENTO NE JE FORTUNOJ – INICITAJ AL BONAĴ STUDOJ – NE MALGRANDAN PARTON EL LA HAVAĴO – KAJ ĈI TIUN PALACON – NOBLE DONACIS – 1856. – LA KOMUNUMO – DEDIĈINTE LA RESTAŬRITAN - KONSTRUAĴON – KIEL SIDEJO DE LA PATRUIAJ INSTITUTOJ – PLIIGIS LA VOTON – 1866

. LA UDINE'A KOMUNUMO – DEKRETIS KE LA NOMOJ DE LA DONANTOJ – LA PLEJ MERITPLENAJ EL LA PATRUJA MUZEO KAJ – BIBLIOTEKO ESTU ĈI TIE ĈIZITAJ POR – LONGDAŬRA MEMORO KAJ EKZEMPLO 1878 – sekvas 56 nomoj.  
JE ĈIAMDAŬRA MEMORO DE MERITPLENAJ DONANTOJ – sekvas 13 nomoj

128. - Ĉefepiskopejo - Patriarka palaco, placo Patriarcato (Patriarkeco) n.ro 1.







De la jaro 1753 ĉefepiskopejo de Udino. Sidejo de la Dioceza Muzeo pri Religia Arto, de la Tiepolo-Galerioj, inaŭgurita en la jaro 1995 de ĉefepiskopo Alfredo Battisti (Masi, Padova, 17 januaro 1925 – Udino, 1 januaro 2012), de la Dolfin-a Biblioteko kaj de la Bartolini-a Biblioteko.

La ĉefepiskopejo estas unu el la pli famaj kaj konata historiaj konstruaĵoj en la urbo dank'al precipe pro la majstraĵoj de Tiepolo, kiuj ornamas ĝiajn ĉambrojn.

Ĝis la jaro 1420 la patriarko loĝis en la kastelo (ekde la originoj de Patriarkeco la kutima sidejo estis, tamen, Ĉiviale de Friulo), poste, pro la konkero de Friulo fare de Venecio, li devis cedi la loĝejon al la venetia guberniestro. Dum ĉirkaŭ jarcento la nobelaj friulaj familioj gastigis la diversajn patriarkojn. Nur poste estis decidita la konstruaĵo de nova ĉefepiskopa sidejo. Patriarko Marino Grimani (Venecio, 1488/1489 - Orvieto, Terni, 28 septembro 1546) en la jaro 1524 deklaris Udinon "Nova Akvilejo" kaj li konstruigis turon, kiu estis freskita pli poste, ĉe la supera etaĝo, de Johano el Udino (Udino, 27 oktobro 1487 - Romo, julio 1561). Ĉe la jarcentfino, Francisko Barbaro (Venecio, 16 marto 1546 - tie, 6 aprilo 1616) konstruigis novan palacon finita en la jaro 1601, kiu havis du simetriajn turojn. Laŭ la projekto de Domenico Rossi (Morkote, Kantono Tiĉino, Svisio, 28 decembro 1657 - Venecio, 8 marto 1737) inter la jaroj 1707 kaj 1708 la palaco estis ordigita laŭ la hodiaŭa formo laŭ la volo de patriarko Danielo Delfino (Venecio, 22 januaro 1688 - Udino, 13 marto 1762), kiu malfermis ankaŭ publikan bibliotekon, kiu estas la unua en Friulo.

En la jaro 1708 arkitekto Domenico Rossi konstruis la aleon kun la biblioteko kaj la ŝtuparon, altigis la ĉefan korpon de la konstruaĵo kaj konstruis la honoran ŝtuparon. La laboroj daŭris ĝis la jaro 1725.

La dekokajarcenta fasado de la palaco havas antaŭajn elementojn, kiel, ekzemple, la portalon supre kiu estas la blazono de Francisko Barbaro kaj la tipa deksesajarcenta fenestro je triforo (serlia).

Ene, post ŝtuparego dekoraciita per stukajoj, oni povas admiri la tre belajn freskojn de Johanbaptisto Tiepolo (Venecio, 5 marto 1696 - Madrido, Hispanio, 27 marto 1770), kiu famigis en la tuta mondo la urbon: "Udino, urbo de Tiepolo".

De la ŝtuparego oni aliras la tronan salonon kie estas la bildoj de patriarkoj de Akvilejo, artaĵo de Tiepolo (1729). La koridoro kaj la ruĝa salono konservas freskojn realigitaj de la artisto mem. La lazura salono havas la volbon tute freskita de Johano el Udino.

Apude tiuj belaj artaĵoj kie la bibliaj personoj, vestitaj per dekokajarcentaj kostumoj, ŝajnas eliri vivaj el la muroj, oni povas admiri artaĵojn de Jandominico Tiepolo (Venecio, 30 aŭgusto 1727 - tie, 3 marto 1804), groteskaĵojn de Johano el Udino, statuojn de Johano Maria Morlaiter (Villabassa de Valo Pusteria, Bolzano, 15 februaro 1699 - Venecio, 22 februaro 1781) kaj dekoraciojn de Nikolao Bambini (Venecio, 1651 - tie, 1736).

Pro la diversaj tertremoj, kiuj sinsekvis en la tempoj en Udino, la bombadoj kaj aliaj pezaj elprovoj, la palaco suferis multenombrajn fendojn kaj estis en danĝero ankaŭ ĝia stabileco. Tial iĝis necesa radikala restrukturado kaj restaŭrado de la freskoj. Restrukturado, kiu estis portita al ĝia fino antaŭ kelka jaro kaj kiu donis ankaŭ la eblon provizi la ejojn de tiuj substruktoj necesaj por gardi kaj precipe eksponi al la publiko la multenombrajn artaĵojn. La Muzeo eksponas artaĵojn kolektitaj el la preĝejoj de la Diocezo kaj gardas

multenombrajn junaĝajn freskojn de Johanbaptisto Tiepolo, datitaj 1726-1729, Johano el Udino, Louis (Ludoviko) Dorigny (Parizo, Francio, 4 junio 1654 - Verono, 29 novembro 1742) kaj aliaj lertaj artistoj.

En la jaro 1821-1822 Ferdinando IV de Borbono, reĝo de la Du Siciloj (Napolo, 12 januaro 1751 - tie, 4 januaro 1825), tie tranoktis irante al Lubiano por la renkontiĝoj de la Sankta Alianco.

De la jaro 1995 la patriarka palaco (aŭ ĉefepiskopejo, kiel ĝi estas nomita de kiam en la jaro 1751 papo Benedikto XIV (Bolonjo, 31 marto 1675 - Romo, 3 majo 1758) forigis la Patriarkecon de Akvilejo) ĝi akceptas la Diocezan Museon.

Sur la fasado estas la memorŝtonoj:

- D.O.M. - PATRIARCHALES ÆDES - HAC PARTE AVXIT - DIONYSIVS DELPHINVS - PATRIARCHA AQVIL. – ANNO SAL. MDCCXVIII - PATRIARCHATVS SVI. XIX (Ĉi tiun parton de la patriarka kontraŭo pliigis Dionizio Delfino patriarko de Akvilejo en la sana jaro 1718, XIX de lia patriarkeco).

- BIBLIOTHECA - FVNDITVS EXTRVCTA - PVBLICO PERENNIQ COMODO - DONATA - A DIONYSIO DELPHINO - PATRIARCHA - ANNO DOMINI MDCCVIII, - PATRIARCHATVS SVI. IX (Biblioteko starigita el la fundamentoj por la publika utilo donacita de Dionizio Delfino patriarko, jaro de la Sinjoro 1708, IX de lia patriarkeco).

**129. - Palaco Antonini - Belgrado, placo Patriarkato (Patriarkeco) n.ro 3.**



Sidejo de la Provinca Administrado.

La palaco situas flanke de la ĉefepiskopejo, en la centra kaj ornamita placo Patriarkeco, kiu alprenis la nomon ĉe la komenco de la XVII jarcento kiam ĉi tie estis fiksita la sidejo de Patriarko de Akvilejo.

Palaco Antonini estas unu el la multaj palacoj, kiun la nobela familio Antonini konstruigis en urbo. Konstruita ĉe la fino de la Deksepa jarcento sur la traceo de la fosaĵo de la tria murzono laŭ ebla projekto de grafo Antono Antonini, la palaco alprenis la nomon de Antonini - Belgrado kiam grafo Horacio el Belgrado, edziĝis al grafino Margareta Eleonora Konstancia Antonini, ekloĝis en la edzina domo.

De Belgrado-anoj poste ĝi pasis al la familio Tellini kaj de tiu al la Udine'a Provinca Administrado, kiu ĝin acetis en la jaro 1891.

La palaco havas fasadon karakterizata per portalo tardodeksesjarcenta surmetiĝita per serlia triforo balkona kaj per ionika plialtigo kun timpano fina. Du abundokornoj, plene de fruktoj, interligas la centran fenestregon, kiu entenas la blazonon de la Provinco: ora aglo kun radia krono ene lazura ŝildo el kiu turgarnita krono altiĝas.

La strukturo de la konstruaĵo spuras la stilon de la tipaj konstruaĵoj veneciaj de la XVII jarcento. La enira atrio prezentiĝas kun kvar ionikaj kolonoj subtene al la plafono kaj funda fenestro, kiu travidigas la ĝardenon. De tiu medio oni aliras la diversajn ĉambrojn kaj la ŝtuparegon dudeklive, kiu kondukas al la supera etaĝo. De la ŝtuparo oni aliras la Konsilian Salonon ornamita per tre riĉa ciklo de dekoracioj; la freskoj estas de Julio Quaglio (Kvaljo) (Lajno Valo de Intelvi, Komo, 1668 - tie, 3 julio 1751), la stukaĵoj de liaj kunlaborantoj Laŭrenco Retti (1692 - 1751) kaj Johano Baptisto Bareglio (Bareljo) (n. Ponna, Komo, 1692). Ĉiuj salonoj estas riĉigitaj per deknaŭjarcentaj dekoracioj.

Neniu udine'a palaco kiel tiu gastigis multe da altranguloj: ĉi tien, fakte, venis: la 13an de marto 1782, Papo Pio VI (Ĉesena, 27 decembro 1717 - Valence sur-Rhône, Francio, 29 aŭgusto 1799); la 22an de oktobro 1792 kaj de la 10a ĝis la 12a de decembro 1807, Napoleono Bonaparte (Ajaĉjo, Korsikio, 15 aŭgusto 1769 - Insulo Sankta Helena, Atlantika Oceano, 5 majo 1821); 1816, 1819 kaj 1825 Imperiestro Francisko I de Habsburgo (Florenco, 12 februaro 1768 - Vieno, 2 marto 1835); la 14an de novembro 1866, reĝo Viktorio Emanuelo II (Torino, 14 marto 1820 - Romo, 9 januaro 1878) kaj la 27an de aŭgusto 1903, reĝo Viktorio Emanuelo III (Napolo, 11 novembro 1869 - Aleksandrio de Egiptio, 28 decembro 1947) kaj reĝino Heleno (Ĉettinje, Montenegro, 8 januaro 1873 - Montepeliero, Francio, 28 novembro 1952).

En la atrio estas pentradoj (1698 ĉirkaŭ) atribuitaj al Julio Quaglio, dum la plafono estis pentrita en la jaro 1909. Ĉi tie estas ankaŭ la busto al Kvintino Sella (Sella de Mosso, Verĉelli, 7 julio 1827 - Biella, 14 marto 1884) de Emilio Dies (n. Romo, 19 aŭgusto 1841) kaj tiu al Aŭgusteno Candolini (Kandolini) (Platiskis de Taipana, Udino, 9 marto 1885 - Udino, 22 januaro 1973) de Julio Piccini (Piĉini) (Udino, 3 julio 1923 - tie, 17 julio 2010).

Sur la fasado estas la memorŝtonoj:

- DE ĈI TIU DOMO – LUIZO KADORNA – LA RENASKIĜITA ITALA AMO – ESTRIS – AL LA VENKOJ ĈE ISONCO KAJ ĈE KARSTO – ANONCOJ DE GLOROJ – DE – VIKTORIO VENETIO – MAJO 1915 OKTOBRO 1917.
- D.O.M. - PIO VI P M - VINDOBONAM PROFICISCENTI - III ID MAR ANN MDCCCLXXXII - IN HANC DOMVM DIVERSATO - ANT ASC ET ALEX PROSPERI FF - ANTONINI COMITES - TANTVM HOSPITEM VENERATI - M.P.P. (Al Pio VI Ĉefpontifiko, kiu la 13an de marto de la jaro 1782 forveturante al Vieno, loĝis en ĉi tiu domo, grafoj Antonini Askanjo kaj Aleksandro, filoj de Prospero Antonini, respektante tiel granda gasto, memoraj surmetis).
- NAPOLEONI M FRANCORVM IMPERATORI - PROVINCIAS NVPER ADDITAS - ITALO REGNO SVO PERLVSTRANTI - QVI VTINVM ADVENIT IV ID DEC MDCCCVII - ET TRIDVO DIVERSATVS EST IN HIS AEDIBVS - SVMMA IN OMNES ORDINES CIVITATIS COMITATE - ASCANIVS ANTONINVS HOSPES - HOSPITI PRAECLARISSIMO P C (Al Napoleono granda imperiestro de francoj, kiu revuis la provincojn antaŭ nelonge aldonitaj al lia Itala Regno, kiu venis Udinon la 10an de januaro 1807 kaj dum tri tagojn loĝis en ĉi tiu konstruaĵo, kun altega ĝentileco al urbanoj je ĉiu klaso, Askanjo Antonini, gasto de la tre eminenta gasto zorgis surmeti).
- ĈI TIE VIKTORIO EMANUELO II – HAVIS – RESPEKTAN OMAĜON – AME KAJ DANKEMA – DE LA LIBERIGITAJ FRIULANOJ – XIV NOVembro 1866

**130. - Palaco de la Prokurorejo de Udino**, placo Patriarcato (Patriarkeco) n.ro 4, angulo strato Lovaria (Lovarja) n.ro 8.



Palaco konstruita de ark. Luizo Taddio (Udino, 1875 – tie, 1955) en la jaroj 1907-1908.

Angula palaco kies enirejo estas ĉe la centra parto kurba.

Ses pilastroj je ebenaj bosoj dividas la rondan parton, en la du etaĝoj (teretaĝo kaj mezetaĝo), en kvin fenestrojn.

Supre la pilastroj estas bretoj kun leonoj, kiuj subtenas la superstarantan balkonon, fermita per balustrado el forĝita fero.

La fasado havas kornicon kun dentaj motivoj.

131. - Palaco Mantica (Mantjka), placo Patriarcato (Patriarkeco) n.ro 5.



n.ro 5

n.ro 6



n.ro 5



n.ro 6

**132. - Palazzo Caiselli (Kaiseli), placo S. Kristoforo n.ro 1, angulo strato Caiselli.**



Sidejo de la Fako pri Historio kaj Defendo de la Kulturaj Havaĵoj de la Udine'a Universitato.

Lokita ĉe la angulo inter placo S. Kristoforo, strato Caiselli, strato Palladio kaj strateto Florio (Florjo). Fakte ĉi tiu palaco estas aro da konstruaĵoj, kiuj etendiĝas en la bloko formita el la stratoj suprecititaj.

Familio Caiselli, el bergamaj originoj, ĉe la duono de la Deksepa jarcento, enloĝiĝis en Udino, per la fratoj Leonardo kaj Petro. Post kiam en la jaro 1647 ili estis investitaj grafoj de Reana, ili aĉetis en Udino antaŭe domon, de iu Jakobo Simeoni, kun la fasado al strato Palladio, poste, de grafo Lukrecio Strassoldo, aliajn konstruaĵojn lokitaj en Kvartalo S. Kristoforo. El tiuj unu dirita "de la bakisto" direkte al la enirkoridoro de Florio-anoj kaj alian kie estis barbira salono.

La restaŭrado de la konstruaĵoj estis konfidita al Johano Baptisto Stella (Spilimbergo, Pordenono, 1745 – Udino, 1800).

Estis la nepoj Leonardo kaj Johano Baptisto de la familio Caiselli, kiuj volis adekvatigi ĉi tiun loĝejon al ilia pliiganta prestiĝo. Kontraŭ la manĝo kaj dormo laboris longe, inter la jaroj 1667 kaj 1687, pentristo Antono Carne (Karneo) (Konkordja Saĝittarja, Venecio, 26 novembro 1637 - tie, 16 decembro 1692) kun la filo Jakobo, repaginte abunde per artaĵoj lian vivtenadon de familio Caiselli. Laboris ankaŭ Paŭlo Poletti kaj Johanbaptisto Tiepolo (Venecio, 5 marto 1696 - Madrido, 27 marto 1770), kiu faris pentraĵon prezentanta "La Virto kaj la Nobleco triumfas super la nescio", iam lokita en la salonego kaj nun gardita en la Urbaj Muzeoj.

La fasado, re prilaborita de la franca milita inĝeniero Jean Le Terrier de Manetot (m. 1 novembro 1809), kavaleria kapitano alvenita Friulon por serĉi azilon (en strateto Florio n.ro 2 B memorŝtono memorigas la restaŭradon), donas al la palaco neoklasikan aspekton. En la jaro 1852 arkitekto Andreo Scala (Skala) (Udino, 15 marto 1820 – tie, 1892) projektas duan enirejon en strateto Florio. La ĉefa fasado estas modifita en la jaro 1954 kiam, post la fermo de la enira pordego, oni akiras loĝion el ŝtono por akcepti butikojn.

Aĉetita en la jaro 1989 de la Udine'a Universitato, ĝi suferis longan kaj profundan restaŭradon, kiu redonis la palacon al ĝia uzado pli larĝa, kune kun la rekupero de la freskoj de Marino Urbani (Venecio, 1764 - Padovo, 1853) kaj de Ferdinando Simoni kaj de la multenombraj pentraĵoj tie entenataj.

Ĝi kaŝas intervenojn de diversaj artistoj, el kiuj Johano Baptisto Canal (Kanal) (Venecio, 1 septembro 1745 - tie, 5 decembro 1825), kiu en la jaro 1803 intervenis por la honora ŝtuparego kaj ĉe la beletaĝo kun Marino Urbani kiel ornamisto, elprovita kunlaborado en la kampardomo de Kortello de Caiselli-anoj mem.

Memorŝtono estas enmasonita en la interna korto de palaco Caiselli. La surskribo prezentas listnomon apartenantaj al la familio mem kaj ĝin volis Kaius Retinacius, kiu okupis oficon kiel duumviro.

Memoŝtonoj:

- LA UDINE'A UNIVERSITATO – AKIRIS EN LA JARO 1984 – KAJ – DE LA JARO 2001 ĜIS LA JARO 2004 – RESTAŬRADIS EN ĈIU ĜIA PARTO – ĈI TIUN ANTIKVAN PALACON – APARTENITA AL – KAISELLI GRAFOI DE REANA – KAJ LAŬ ILIA VOLO TRANSFORMITA – EKDE LA DEKNAŬA JARCENTO – DE LA FRANCA ARKITEKTO – JEAN LE TERRIER DE MANETOT – UNIVERSITATAJ REKTOROJ – FRANKO FRILLI – MARZIO STRASSOLDO EL GRAFFEMBERGO – FURJO HONSELL

- CF HVIRTFI – RETINACIALESE – CVN DAVXOR – RETINAGALFGAIA - RETINACIVSLF CRISTVS

133. - Domo Della Rovere, placeto Antonini n.ro 4.



134. - Palaco De Brandis, placeto Antonini n.ro 6.



La enirejo estas post ponteto super la rojo.



**135. - Palaco de la Klasila Liceo, placo I Majo n.ro 26.**



La Ŝtata Klasika Liceo "Jakopo Stellini" de Udino estas la plej antikva klasika liceo en la urbo. La Liceo naskiĝis en la jaro 1808 laŭ la volo de la aŭstria administrado, sed la humanisma instruado estis en Udino ekde la jaro 1297, kiam estis malfermita publika lernejo kun literatura orientiĝo. Dum la postaj jardekoj la lecionoj daŭris regule, escepte de la Lernojaro 1849-1850, kiam la Liceo estis fermata pro dispozicio de Radetzky (Třebnice, Montenegro 2 novembro 1766 - Reĝa Vilao en strato Palestro, Milano, 5 januaro 1858), pro publika ordo, kaj la Liceo superis ankaŭ la pason al la Itala Regno. Ĉar la nombro de la aliĝintoj pliiĝis de jaro al jaro, iĝis necesa la konstruo de nova sidejo, kiu estis finita en la dua jardeko de la jaro 1900, sed komence la studentaro ne povis ĝin uzadi, pro la eksplodo de la Granda Milito. La konstruado de "Stellini" estis finita dum tre mallonge da tempo kaj tio estas dum la jarduoj 1914-1915, sed ĝia reala destino okazis en la lernojaro 1918-1919 jam en la pleno de la jaro ĉar la sidejo iĝas, ĝis oktobro 1917, Ĉefstabejo de la Itala Plejalta Komando kaj en la jaroj 1917-1918 ĝi estas okupita de la germana invadinto. La "Stellini" estas titolita al fakulo Jakopo Stellini (Ĉividale de Friulo, Udino, 27 aprilo 1699 – Padova, 27 marto 1770) ĉe la fino de la Deknaŭa jarcento.

Ene estas memorŝtonoj:

- PIETRO CANAL - F I PRAESIDI VIGILANTISS - QVI PVB LYCAEI PERPET VITATI STUDENS - VII VIRUM VTIN VOTIS FAVENS - AB AVGVSTO VENETO SENATV - ANNVM SUBSIDIVM IMPETRAVIT - CLER REC S PAVLI MODERATOIRES - C A M PP MDCCVC (Al Petro Kanal, tre vigla guberniestro, kiu zorgita pri la licea ĉiamdaŭro, apoginte per voĉoj de sep udine-anoj, el la majesta venetia senato akiris ĉiujaran sebvencion la moderigantoj... lokis 1795).
- FRANCISKO POLETTI – SOLDATO DE LA PATRIO POR DEFENDO DE ROMO – FILOZOFO – LA POZITIVAN SKOLON DE JURO ANTAŬIRIS – ĈI TIE – DUM KVIN JARKVINOJ ESTRO – LA DEVON INSTRUIS KUN LA EKZEMPLO – AMIKOJ KAJ SKOLANOJ P.P. 1897
- MORTINTOJ POR LA PATRUJO – 1915-1918 – INSTRUISTOJ sekvas e nomoj – STUDENTOJ sekvas 26 nomoj
- JUNIO – 1927 – EN ĈI TIU TRANKVILA SIDEJO – PRI LA KLASIKAJ STUDIOJ – DE JUNIO 1915 ĜIS OKTOBRO 1917 – LA PLEJ ALTA KOMANDO – VIGILIS PRI LA LASTA MILITO – MAKSIMUMA KAJ RADIA – DE LA ITALA RELEVIĜO

**136. - Palaco Gen. Cantore (Kantore), Palaco Maffioli, Placo I Majo n.ro 27.**



Sidejo de la 12a Taĉmento Substrukturoj (eks Militkonstrua Oficejo).

La palaco estis konstruita inter la jaroj 1920 kaj 1926 laŭ projekto de ark. Petro Zanini (Udino, 1895 - tie, 6 majo 1989) kiel totala refaro de la fabriko por la vitrolaboro de la firmo Maffioli; apudigis poste la firmao masonaĵparton projektita de Provino Valle (Udino, 10 marto 1877 - tie, 12 aŭgusto 1955). La palaco havas kvarangulan formon kun alrigardo al la publika spaco. La konstruaĵo estas aranĝita laŭ du partoj volumene apartaj: unu angula kaj unu centra, kie origine estis lokitaj la du ĉefaj eniroj. La fasado estas vertikale markita per tri korbelfenestroj, kun geometriaj dekoracioj. La interna ĉefa ŝtuparo kun balustrado estas de Alberto Calligaris (Kalligaris) (Udino, 29 septembro 1880 - tie, 20 aprilo 1960).

**137. - Palaco Ottelio (Oteljo), placo I Majo n.ro 29.**



Sidejo de la Ŝtata Konservatorio "Jakopo Tomadini".

La unuaj sciigoj pri la konstruaĵo reiras al la jaro 1555, kiam la nobela Andreo Dolfin del Banco (de Banko), venetia patricio, konstruigis ponton el ŝtono, kiu transiru la rojon apud lia domo, doninte al la zono aspekto preskaŭ venetia. Oni ne havas aliajn sciigojn ĝis la jaro 1616 kiam ĝi estas loĝita de iu Johano Martino Bonecco (Boneko), apartenanta al familio de drapistoj, kiu havis drapbutikon en Merkatovekjo. En la jaro 1656 tamen la nepo Alvisè Bonecco vendis la konstruaĵon al la nobelaj Ottelio-anoj, kiuj jam posedis terenojn destinitaj al ĝardenoj najbaraj al la propraĵoj de la Seminario kaj ĝuis prestiĝon kaj en la politika kampo kaj ekonomia.

En la jaro 1808 ĝi estis transformita en militan hospitalon kaj en la jaro 1866 ĝi estis sidejo de la karcera direkcio. En la jaro 1920 la eks domo Ottelio iĝis sidejo de la Muzika Instituto.

La ĉefa elemento estas la bela triforo serlia, kompletigita per balustrado el ŝtono, kiu, subtenita per kvar fortikaj kolonoj, ŝajnas preskaŭ subpremi la suban portalon.

Ĉirkaŭ la palaco diversaj kamparaj konstruaĵoj, iam loĝitaj de kamparanoj, entenas la korton kie estas majestaj arboj kaj puto kun ornamaĵo el forĝita fero. Ĉe unu flanko de la korto estas turo kaj apud la enira pordego estas la familia kapelo dediĉita al S. Gaetano.

La palaco estas fermita, dume la korto ĉiam estas videbla.

**138. - Palaco Cappellari (Kapelari), placo I Majo n.ro 37.**



La konstruaĵo estis projektita de ark. Provino Valle (Udino, 10 marto 1877 - tie, 12 aŭgusto 1955).

**139. - Palaco D'Attimis, placo I Majo n.ro 38.**



Antaŭe la palaco estis de la familio Piccoli-Pikoli kaj hodiaŭ palaco Attimis-Di Maniago.  
Pentraĵoj kaj stukajoj estis parte detruitaj de incendio en la jaro 1964 kaj de la tertremo de la jaro 1976.

**140. - Palaceto aŭ Gotika Domo Venecia, placo XX Septembro n.ro 2.**



La tiel nomata "Domo Venecia" origine estis en la dombloko malantaŭ la Loĝio Lionello. Laŭlonge strato Rialto, en la Dekkvina jarcento, estis konstruitaj diversaj konstruaĵoj de nobelaj familioj, el kiuj ĉi tiu, konstruigita de familio de grafoj el Montegnacco-Montenjako.

En januaro 1910, por la konstruo de la nova urbodomo, estis antaŭfiksita la disfalgigo de la ekzistantaj konstruaĵoj inter strato Rialto kaj strato Cavour (Kavur). Post intensa debato pri la oportuno disfaligi ĉi tiun, kiu eble estis la unika restaĵo spegulante la venecian epokon, oni decidis konservi ĉi tiun antikvan domon, almenaŭ per la originaj elementoj de la fasado.

Tiele ĝi estis malmuntita kaj poste, en la jaro 1929, ĝi estis remuntita per la samaj elementoj kie estas hodiaŭ post kiam ĝi estis disfalgita ĉirkaŭ la jaro 1920 por loki la nova urbodomo. Oni ne sukcesis gardi kelkajn freskojn. Tamen la domo esprimas la tutan ĝian gotiko-venecian stilon, precipe per la speciala formo de la duforoj kaj triforoj.

Sur la fasado estas triforo surmetiĝita per bela dekkvinajarcenta balkono kun angulaj leonetoj.

## 141. - Palaco Antivari - Kechler (Kekler), placo XX Septembro n.ro 14.



La historio de palaco Kechler, kiel ĝi kutime estas nomata, estas nerompeble plektita al tiu de elstaraj familioj kaj gravaj okazaĵoj por la urbo.

Antivari-anoj apartenis al familio tre konata, posedanta de diversaj industrioj - kanabfabriko, teksta instalaĵo, tanejo kaj silkofabriko - kaj, dum la unuaj jardekoj de la Deknaŭa jarcento, ili iĝas la firmo la plej grava en la udina provinco. La dinastio Antivari, tamen, ne estis friula: nomita origine Lazzaroviĉ, estis influa serba familio. Prapatro de Antivari estis la nobela serbo Milos Lazzaroviĉ, kiu forĵuris la islaman kredon kaj iĝis kristano. Por eviti Turkanojn Lazzaroviĉ-anoj elmigris antaŭe, en la jaro 1420, al Montenegro, en la urbo Antivari, kaj poste, en la jaro 1575, pro la milito inter Venecio kaj Turkoj, al Friulo. Propre en Friulo, restitaj sen titolo, ili ŝanĝis la nomon kontraŭ Antivari kaj ili sukcesis praktikante diversajn entreprenistajn kaj komercajn aktivecojn.

Tiele originis la komerca firmo Antivari, kiu, per diversaj industrioj, riĉiĝis ĝis iĝi en la unuaj jardekoj de la Deknaŭa jarcento la plej grava en la provinco.

Jozefo Antivari unuigis lian fortunon kun tiu de Jakopo Linussio (Villa di Mezzo de Paŭlaro, Udino, 8 novembro 1691 - Tolmezzo, Udino, 17 junio 1747), fondinto de la karnja tekstila industrio, edzinigante la filinon Katarina kaj li ekloĝiĝis en Udino.

La juna paro decidis loĝi en placo de la Fikso (nun placo XX Septembro), kie, en la jaro 1795, naskiĝis Petro Antivari (Udino, 1795 - 1868).

La juna Antivari, spurante la patron, daŭrigis la komercan ascendon sed al tio apudigis lian amon al la arto, iĝante mecenato de la ĝemona skulptisto Vincenzo Luccardi (Lukardi) (Ĝemona de Friulo, Udino, 23 februaro 1808 - Ĝenacano, Romo, 14 novembro 1876) kaj konstruigante palacon Antivari.

La konstruaĵo aperas kiel vigla kaj eventoplana centro de aktiveco, kiu enhavis domon por uzo kiel familia loĝejo kaj por diversaj uzoj kiel butikoj. Ĉe la teretaĝo estis diversaj magazenoj por tolaĵaroj, du butikoj kaj unu skribilaro.

Antivari-anoj tamen ne loĝis longe en la eleganta palaco el la fasado je pilastroj, ĉar, en la jaro 1868, je la forpaso de Petro, kiu ne havis virajn idojn, la nevoj, filoj de Katarina, decidis vendi la palacon al ilia kuzo Karlo Kechler (Triesto, 1823 - Udino, 1901).

Karlo Kechler estis junulo je modesta familio origina el Fiume. Post diversaj migradoj, li alvenis en la jaro 1835 al Skodovaka (Ĉervinjano de Friulo), kie Chiozza (Kioca)-anoj, proprietuloj de la sapfabriko, kortuŝiĝis de tiu junulo, kiu tiam estis mizere vestita kaj lin dungis en la fabriko.

Petro Antivari, vizitante la bofratinon Tereza Kircher (Kirker) edzino de Jozefo Chiozza, notis Karlon kaj lin kunportis Udinon, konfidante al li la bonan ordon de ŝiaj oficejoj, praktike la taskon kiel portisto en la palaco en placo XX Septembro. Karlo, vigla je inteligento, per la apogo de lia protektanto, formiĝis sufiĉa kulturo kaj li ne tro atendis antaŭ ol spertiĝi de la laboro ĝis iĝi administranto de Petro Antivari.

Li kunigis kun la ĝenerala kulturo grandan talenton kaj elstaran entreprenistan sagacon. En la jaro 1854 li edzinigis ties nevon, Anĝjola Chiozza (1832 - 1894) kaj 14 jarojn poste, je la forpaso de Antivari, li heredis la udinan palacon, kiu nomiĝis Antivari-Kechler.

Amanto de la bona muziko kaj de la kleraj vizitadoj, li malfermis la salonegojn de lia palaco organizante por la plej belaj nomoj el la udina nobelaro belegajn akceptojn. Li interesiĝis pri politiko kaj, arestita de la aŭstria polico por liaj iredentistaj ideoj ekde la juneco, li pasigis unu jaron en la karceroj de la Olmutz-fortreso.

Unu el la filinoj de Kechler, Kamila, edzigis en la jaro 1886 Dominico-n Pecile (Peĉjle) (Udino, 1852 – Sankta Georgo de la Rikinvelda, Pordenono, 27 majo 1924), filo de senatano Gabrielo Luizo Pecile (Faganja, Udino, 11 novembro 1826 - tie, 27 novembro 1902), unu el la personecoj la plej influa en la urbo, iĝante fidela edzino kaj kunlaborantino dum liaj studadoj pri agronomio. Sed samtempe ŝi zorgis pri bonfaroj, iĝante ankaŭ ruĝkruccano en la Milita Hospitalo de la Itala C.R.I. (Ruĝa Kruco Itala) ĉe “Toppo Vassermann” dum la Granda Milito.

Ĉe la komenco de la nova jarcento, la palaco gastigis la francan Ĉefministro Aristido Briand (Nantes, Francio, 28 marto 1862 - Parizo, Francio, 7 marto 1932), alvenita Udinon en februaro 1916.

En la jaro 1947, post la detruo de la konstruaĵoj en la korto de la palaco, oni ekkonstruis la unuan ĉielskrapanto de la urbo, kiu enhavis ankaŭ la Kinejon “Astra” laŭ projekto de inĝ. Ferdinando Viĉentini, inaŭgurita en la jaro 1948. La kinejo, tamen, estis definitive fermita la 10an de majo 1970 kaj la tuta teretaĝo iĝis sidejo de magazenoj kaj destinita al butikoj

En septembro 2012 la palaco, tute renovigita, estis aĉetita de Maksimo Blasoni kaj Georgo Zucchini (Zukini), grupanoj de Sereni Orizzonti (Serenaj Horizontoj).

La palaco volita de Petro Antivari naskiĝis do en la jaro 1832. Li sin adresis al unu el la plej bonaj arkitektoj el la tempo, Jozefo Jappelli (Venecio, 14 majo 1783 - tie, 8 majo 1852). Malgraŭ la nomo malmulte konata en Udino, Jappelli, gravulo pri novklasikismo, jam subskribis unu el la plej belajn kafejojn en Padova, Caffè “Pedrocchi” (Kafejo “Pedrokki”).

Kune kun la proprietulo Petro Antivari, estis subskribinto de la projekto Petro Salvador Cappel (Kappo) Muraro, kiu estris la laboron de masonistoj kaj ŝtontajlistoj, dume vokto de la laboroj, kiuj komenciĝis en la jaro 1833, estis arkitekto Johano Baptisto Bassi (Pordenono, 3 junio 1792 - Sankta Margareta de Gruanjo, Moruco, Udino, 19 majo 1879).

Konstruaĵo je tri etaĝoj. La fasado, iam stukita el solida marmorino, montras ĉe la teretaĝo arkitravan portikon subtenita de pilastroj. En la centra parto ĝi malfermiĝas, je alteco de du etaĝoj, en timpana loĝio per ionikaj kolonoj. Horizontale, ĝi estas trairita de freta strio bareliefe inter la 2a kaj 3a ordo de fenestroj. Denta motivo fine kompletigas la linion de la tegmento kaj de la frontono.

La dekoracioj el stuko estas laboro de Julio Luccardi (Lukardi) (n. Ĝemona de Friulo, Udino), frato de la pli fama Vincento (Ĝemona de Friulo, Udino, 23 februaro 1808 - Ĝenacano, Romo, 14 novembro 1876).

De la enira pordego oni eniris en grandan atrion kun ses pordoj. Tiu centra maldekstre enigis larĝan ŝtuparon, kiu kondukis al la beletaĝo kaj aliaj ĉambroj de la sola dekstra parto de la dua etaĝo; la aliaj pordoj de la atrio donis aliron al skribilaro, al magazenoj kaj al butikoj por la vendo de ledoj, toloj kaj ŝtofoj. Ĉi tiuj, kun montrofenestroj sub la portiko, estis la unuaj en la urbo kaj poste ili servis kiel modelo por aliaj butikistoj.

La beletaĝo, hodiaŭ ligita kun la apuda hotelo “Astorja Italio”, estas destinita al Kongresa Palaco. Ĉi tie oni povas admirari saloneton kun origina empira meblaro kaj kelkajn ĉambrojn laŭ venecia tradicio.

**142. - Domo Barcariccio (Barkariĉjo), placo XX Septembro n.ro 18.**



Deksesjarcenta portika domo de familio Caimo (Kajmo), nun sidejo de Hotelo "Astorja".

Sur la fasado estas la memorŝtono: SCIU POSTEULOJ – KIAMANIERE ĈE LA MILITFINO DE LA JARO 1866 – NE ANKORAŬ FINITA LA BATALPAŬZO – AL LA URBO JAM LIBERIGITA DE AŬSTRIANOJ – MINACIS MALAMIKA INVADO – SED – KVINTINO SELLA – EN LA MEMORINDA NOKTO DE la 9an de AŬGUSTO – INTERKONSILIĜINTE EN LA SALONEGOJ DE ĈI TIU HOTELO – KUN LA ESTROJ DE LA NACIA ARMEO – MULTE LI KLOPODIS – KIU SUFIĈIS EVITI – LA DAMAĜOJN KAJ LA HONTON PRI LA TIMITA REVENO. – LA KONSTITUCIA ASOCIO – NE SENZORGA PRI LA OKAZINTAĴO – SURMETIGIS O.M. EN LA JARO 1884

**SELLA Kvintino** (Sella de Mosso, Biella, 7 julio 1827 - Biella, 14 marto 1884), industriisto, ekonomikisto kaj ŝtatiso, Ministro pri Financoj en 1862, Ministerio Rattazzi (Rattaci) Urbano (Masio, Aleksandrio, 30 junio 1808 - Frosinone, 5 junio 1873), poste en 1864, Ministerio La Marmora Alfonso Ferrero (Torino, 17 novembro 1804 - Florenco, 5 januaro 1878), kaj en 1869-1873, Ministerio Lanza (Lanca) Johano (Kasale Monferrato, Aleksandrio, 15 februaro 1810 - Romo, 9 marto 1882), li restarigis la fikson per ŝparaj reĝimo "ĝisoste" kaj per impostoj (el kiuj la malpopolara muelrajta imposto de 1868). En 1863 li starigis la Italan Alpan Klubon kaj en 1870 li estis el tiuj, kiuj volis Romon ĉefurbo. Li estis nomumita reĝa komisaro en Friulo de julio ĝis decembro 1865 starigante la bazon por la progresigo kaj la ekonomia progreso de la teritorio.



**143. - Palaco INA, placo XX Septembro n.ro 23.**



Sidejo de la Nacia Asecura Instituto de Udino (I.N.A.).

La palaco, konstruita laŭ projekto de Provino Valle (Udino, 10 marto 1877 – tie, 12 aŭgusto 1955), situas en areo entenata inter placo XX Septembro, strato Nazarjo Sauro (Saŭro), strato Cavour kaj strato Paŭlo Diacono (Diakono), jam okupita de palaco Angeli (Anĝeli), disfalgita en la jaro 1917 dum la Unua Mondmilito, kaj de aliaj konstruaĵoj.

La teretaĝo, destinita al komercaj aktivecoj, prezentas portikon laŭlonge la perimetro de la palaco, krom strato Nazarjo Sauro.

Prilaboritaj kornicoj el artefarita ŝtono skanas la superajn partojn de la fasadoj.

**144. - Palaceto Dormisch (Dormiŝ), placo Cavedalis (Kavedalis) n.ro 11.**



Konstruita en la jaro 1928 laŭ projekto de ark. Hektoro Gilberti (Ĝilberti) (Udino, 1876 - tie, 1935) por esti destinota al oficejoj de la entrepreno kaj al reziduzado. La konstruaĵo estas limigita de aleo Bassi unuflanke kaj de la kanalo Ledra aliflanke, kie estis lokita la eks bierfabriko de Francisko Dormisch, apude la turo de Pordego Villalta. La palaceto, destinata al oficejoj de la firmo Dormisch kaj al rezidejoj nune ne estas utiligita. La konstruaĵo pliiĝas je kvar etaĝoj en la centra parto je turo, kaj tri etaĝoj en la flankaj aleoj. La eniraj portaloj kaj la centraj fenestroj ce la unua etaĝo estas cintritaj rondarke, la aliaj fenestroj estas arkitravitaj. Soklo el rustika bosaro kaj tegaĵo el plata bosaro unuigas ĉe la teretaĝo la tri masonaĵpartojn; ĉe la superaj etaĝoj la fasadoj estas stukitaj, per angulaj kvadroŝtonoj el simpla bosaro kaj nobligitaj ĉe la altaj partoj per dekoracioj je grafito. Balkonoj kun balustradoj el arta ŝtono, prilaboritaj kradaĵoj el forĝita fero kompletigas unu el la konstruaĵoj la plej reprezentaj el la eklektita gusto de Hektoro Gilberti. Dorse la konstruaĵo elstaras la fulturo el brikoj de la eks fabriko.

**145. - Palaco Moretti, esplanado Osoppo n.ro 3.**



Konstruita laŭ desegno de ark. Hektoro Gilberti (Ĝilberti) (Udino, 1876 – tie 1935) en la jaroj 1930-1931. La ĉefa fronto al esplanado Osoppo prezentas la portikan teretaĝon, skanita per cintra fenestroj rondarke; ĉe la dua kaj kvar etaĝo estas balkonetoj. La fronto al aleo Volontuloj de la Libero ripetas la skemon de la ĉefa fronto; la dorsa fasado havas du korbelfenestrojn. En la jaroj 1999-2001 la konstruaĵo estis tute restrukturita de Kristiano Michieli (Mikieli) tenante la uzdestinadon; la historia bierejo Moretti lasis la lokon al meblara butiko.

**146. - Pordego Aquileia (Akvileja), placo D'Annunzio - placeto de la Puto.**



De placo D'Annunzio



De strato Akvileja

Sidejo de la Socio por la Protekto de la Historiaj Kasteloj en Friulo-Julia Venetio.

Estis 13 la pordegoj, kiuj permesis eniri Udinon. Pordego Akvileja, lokita sude de la urbo, estis tiu, kiu kondukis al la fama Patriarkeco Akvilejo kaj do al Grado. Ĝi estis finita ĉirkaŭ la jaro 1440, kaj, kune kun la arkoj kaj la turo ĝi estas parto de la kvina kaj lasta murzono de Udino, konstruita kun la celo defendi.

La turo reiras al la jaro 1373. Ĝi estas masiva konstruaĵo el ŝtono kaj brikoj kun ogivaj fenestroj kaj arketoj ĉe la subtegmento. Ĉe la suda flanko de la turo estas kvar blazonoj el ŝtono, el kiuj nur tri trovis ĝustan atributon. De maldekstre: de nobelaj Savorgnan (Savornjan) (kiuj konstruigis la pordegon), de Patriarko de Akvilejo kaj de la Udine'a Komunumo.

La 5an de oktobro 1924, okaze de la vizito de Viktorio Emanuelo III (Napolo, 11 novembro 1869 – Aleksandrio de Egiptio, 28 decembro 1947), la unua fojo kiam la reĝo revidis la urbon post la invado, sur la tri arkoj estis skribita, unu vorto po arko, ECCE - VTINI - FIDES.

Sur la ena fasado de Pordego Akvilejo estis du memorŝtonoj: unu memore al Hironimo Venerio (Venerjo) (Udino, 18 septembro 1777 - tie, 4 marto 1843) kaj alia kun gotika skribo nelegebla.

Sur la turo estas memorŝtono nun jam sen kelkaj literoj. Oni transkribas kiel ĝi estis legebla: XORNIA ET PP RIBIS - QVÆ M DE NIS - INTERCIDETANT DILIGENTIA ET - VIGILANTA INSIG EROMINA - VENETO ÆS S PRISTINO - DECORI ET VENTO RES V - ANNO DOMINVM DCXXXII (En la jaro de la Sinjoro 1632, pro detruo, la konstruaĵo estis diligente readaptita je venetiaj kostoj).

**147. - Pordego Manin aŭ Turo S. Bartolomeo, strato Manin.**



De placo I Majo



De strato Manin

Ĝi estas la plej antikva ankoraŭ ekzistanta en la urbo. Ĝi reiras al la fino de la jaro 1200 kaj ĝi estas parto el la tria murzono, konstruita inter la jaroj 1273 kaj 1299, kiu ĉirkaŭis la friulan ĉefurbon. Kiel antikvaĵo ĝi estas la dua turo de Udino restita integra post tiu de la Horloĝo.

Origina estas la malsupera instalado, dume la superaj etaĝoj estis restaŭritaj dum la postaj jarcentoj. La flankaj pasoj ĉe la pordego estis malfermitaj inter la jaroj 1934 kaj 1941. Ĝi estas la tradicia eniro al la historia centro de la orienta zono de la urbo.

Estas pentritaj blazonoj, el kiuj, dekstre, la nigra aglo sur flava kampo, simbolo de la Sankta Romana Imperio Germana.

Ĝi iĝis la simbolo de la strato, kiu estis nomita Kvartalo Ĉividale aŭ Kvartalo Sankta Antono interne. Pro la konstruaĵo de la privata kapelo de familio Gubertini, ĉe la angulo al strato de la Prefektejo, dediĉita al S. Bartolomeo, detruita en la jaro 1810, ĝi estis nomita Kvartalo S. Bartolomio. Sekve, ankaŭ la pordego estis tiele nomita.

**148. - Pordego Villalta, strato Micesio (Miĉesjo) n.ro 2.**



Sidejo de la Friula Socio pri Arkeologio.

Konstruigita de guberniestro Johano Emo (Venecio, 21 februaro 1419 - Lagoskuro, Feraro, 15 septembro 1483) en la jaro 1480. Starigita en la jaro 1436, ĝi estis parto de la kvina murzono.

La turo, alta 18 metrojn, provizita per malgrandaj fenestroj estis garnizonita de malgranda nombro da soldatoj, kiuj havis ĉe la teretaĝo la gvardiejon kaj ĉe la superaj etaĝoj la loĝejon de la estro.

Neniun gloran okazaĵon oni devas al ĉi tiu Pordego kie la gardistoj sinsekvis je la gardado de la turo, iafoje rekte de patro al filo. En la Deknaŭa jarcento la Pordego estis inkluzivita en la akciza zono kaj tiam ekvigilis akcizistoj. La Pordego havis antaŭe ponton el ŝtono, kiu estis detruita okaze de katastrofa altiĝo de Torre en la jaro 1724.

En la jaro 1891 estis detruitaj la restantaj muroj, lokitaj flanke, al kiu ĝi estis ligita. El tiuj spacoj naskiĝis poste la konstruaĵoj de la Bierfabriko Dormisch (Dormiŝ). Dum la unua postmilita periodo arkitekto Hektoro Gilberti (Ĝilberti) (Udino, 1876 - tie, 1935) konstruis, apude la fabriko, domon Dormisch, kiun ankoraŭ hodiaŭ oni povas admiri.

La turo, post la dua mondmilito estis en malbona stato kaj oni pensis ĝin disfaligi pro "higienaj kialoj" sed dum tage kaj tage en la loka gazetaro polemikoj furiozis inter la favoraj pri la disfaligo kaj tiuj, kiuj vidis por la antikva Pordego Villalta monumenton salvi ĉiakoste.

Fine la Komunuma Konsilio decidis ne disfaligi Pordegon Villaltan kaj tiele ĝi restis netuŝita ĝis niaj tagoj kun la blazono de la urbo apudigita de la insignoj de la familioj Savorgnano (Savornjano) kaj del Torso artaĵoj de nekonata udina ĉizisto.

Kun Pordego Akvileja, ĝi estas unu el la du restitaj el la kvina murzono.

Sub la arko de la turo estas memorŝtono: ANNO SAL M - CCCCLXXX - IO HEMVS IVLI - ENSIVM PRAE - TORVTINI MOE - NIA ET FOSSA - ET CRASSA MV - RORVM APPEN - DICE INTRA AN - NVVM MVNVS - FOELICITER - COMMVNIVIT (Jaro de la Sano 1480 Johano Emo guberniestro de Friulo antaŭ la jarfino li kondukis la fosaĵojn kaj la sekajn murojn al ĝiaj finoj ĉe la ĉirkaŭurbo de Udino).

149. - Pordego Torriani aŭ Turo S. Maria, strato Zanon n.ro 26.



Antikve dirita Pordego Nova, starigita en la jaro 1295, ĝi estis parto de la kvara mezepoka murzono.

## LA MUREGOJ DE LA URBO UDINO

### 1a ZONO - Konstruita ĉirkaŭ la unua duono de la Dektria jarcento

Ĝi entenis nur la Kastelon defendita de muroj je montetpinto kaj sube de la laĝeto en placo Humberto I (la nuna placo I Majo) kaj de fosaĝo, kiu respondas ĉirkaŭ al strato Manin, placo Viktorio Emanuelo (nun placo de la Libereco), strato Merkatovekjo, strato Bartolini kaj strato Portanuova.

### 2a ZONO - Konstruita en la dua duono de la Dektria jarcento de patriarko Gregoro el Montelongo (Ferentino, Frosinone, 1190 ĉirkaŭ – Ĉividale de Friulo, Udino, 8 septembro 1269).

Ĝi kunigis al la Kastelo la Urbon Udino kaj ĝi estis entenita de strato Cavour, strato Zanon, placo Pecile (Peĉjle), strato Rizzani (Ricani), placo S. Kristoforo kaj de la roĵo ĝis la 1a zono, en strato Bartolini.

### 3a ZONO - konstruita ĉe la fino de la XIII jarcento de patriarko Rajmondo Della Torre (Milano, 1230 - Udino, 23 februaro 1299).

Nomita "de la Pordegoj", ĝi disiĝis de la 2a ĉe la monteto dorse la konstruaĵo de la Publika Pesejo kaj ĝi laŭiris la straton Patriarkato, straton Piave, straton Gorgi (Gorgi), straton Crispi (Krispi), placon Garibaldi kaj ĝi rekuniĝis al la antaŭa ĉe la ponto en strato Poscolle (Poskolle).

Norde ĝi disiĝis de la 2a dorse la preĝejo S. Petro martiro kaj trapasis al la bienoj Pecile (Peĉjle) kaj Florio (Florjo), strato Cosattini (Kosattini), strato Palladio, al strato Antonini kaj al palaco de la eks Itala Banko, ĝi kuniĝis al la 2a post strato Portanuova.

La muregoj estis longaj ĉirkaŭ 2.129 metrojn kaj ili enhavis ses pordegojn: Ĉividale (Pordego Manin), Akvileja, Grazzano (Gracano), Poscolle (Poskolle), Villalta kaj Gemona (Ĝemona).

La roĵoj Palma kaj Udino, kiuj banis la 2an zonon, estis deviigitaj por protekti la muregojn (°).

### 4a ZONO - XIV jarcento

Ĝi disiĝis de la 3a ĉe la malnova hospitalo kaj fermis la kvartalojn en strato Cussignacco (Kussinjako) ĝis strato Tullio (Tulljo), Kvartalon Gracano, placon Cella (Ĉella), aleon de la Ferfabrikoj, straton Tullio, Kvartalon Poscolle kun strato Marangoni, strato Marko Volpe, strato Baldasseria kaj strato Mazzini kaj ĝi kuniĝis al la 3a dorse la preĝejo S. Petro martiro.

### 5a ZONO - XV jarcento

Ĉi tiuj muregoj havis vojon, kiu de Pordego Cussignacco, pluiris al strato T. Ciconi (Ĉikoni) kaj strato Percoto (Perkoto), strato Battistig, strato Romo, strato Leopardi, placo D'Annunzio kie estas Pordego Akvileja.

La muregoj pluiris al strato XXIII Marto kaj strato Triesto ĝis Pordego Ronchi (Ronki). Ili atingis placon Oberdan kie estis Pordego Pracchiuso (Prakiuso). Ili ĝiris al strato Diaz ĝis aleo de la Venko kaj placo Osoppo, kie estis Pordego Gemona (Ĝemona). Ili pluiris al strato di Toppo, placo Diacono (Diakono), Pordego S. Lazaro, strato Micesio (Miĉesjo), placo Cavedalis (Kavedalis) kie estas ankoraŭ Pordego Villalta kaj ili kuniĝis al la 4a zono en strato Marko Volpe.

Ĉi tiuj muregoj estis longaj 7.119 metrojn kaj ili enhavis dektri pordegojn kun levpontoj.

La 5a zono fermis la tutan malnovan urbon kaj koincidas, ĝis niaj tempoj, kun la akciza zono, kiu estis disfaligita ĉe la komenco de la jaro 1900.

Nune restas nur la turoj en strato Manin, Akvileja, Villalta kaj Zanon dirita S. Maria (4a zono).

---

### Noto (°)

La roĵoj de Udino estis ses: la plej gravaj estis la Roĵo Palma kaj la Roĵo Udino.

La Roĵo Palma naskiĝas, kun tiu Udino, el unika kanalo, kiu prenas akvon el la Torento Torre. Ĝi estas la unua roĵo nomita en dokumento de patriarko Ulriko en la jaro 1171.

La roĵoj de Udino pluvivis nur en tre mallongaj malkovritaj partoj. La unua esti kovrita en la jaro 1951 estis la roĵo en strato Gemona. La postan jaron estis la vico de tiu en strato del Gelso (Ĝelso). Sekvis poste en la jaroj 1955 - 1956 la kovro de la roĵo en strato Grazzano, strato Gorgi (Gorgi) kaj strato S. Aŭgusteno. La lasta esti kovrita en la jaro 1963 estis la roĵo en strato Agrigento.



## UDINE'AJ KVARTALOJ

En Udino estas 7 historiaj kvartaloj en la aero limigita de la antikvaj muregoj mezepokaj hodiaŭ estante parto de la historia centro. La kvartaloj estas:

### **Kvartalo Aquileia (Akvileja)**

La strato, kiu de placo sub la kastelo direktiĝas suden estas de ĉiam titolita al Akvileja, al kiu ĝi kondukis. Ĝi estis nomita ankaŭ Udino suba.

La plej antikva, la nuna strato Viktorio Veneto, estis enmetita en la urbon, ĉirkaŭ la dua duono de la Deltria jarcento, en la tria murzono kie, ĉe la kruciĝo kun stratoj Piave kaj Gorgi, oni malfermis unu unua "Pordego Akvileja".

Ĉe la komenco de la posta jarcento oni komencis la kvinan murzonon, kies konstruado daŭrigis ĉirkaŭ jarcento. Naskiĝis tiele la kvartalo, kiu estis disigita je due partoj: "de ene" kaj "de ekstere".

En la jaro 1373 oni konstruis la turon, kiu oni vidas ankoraŭ hodiaŭ funde la strato. La 7an de novembro 1441 oni decidis konstrui "unam portam tam pulchram et speciosam quam fieri poterit quod per eamdem maior habetur concursa gentium quam per aliquam aliam portam...". Oni scias ke tiu pordego apartenis al la kvina zono de la urbo kaj ĝi estis restaŭrita por ĝin igi pli bela kaj gracia sekve de parta detruo.

La nobela Elizabeto de Porcia vidvino Sbrojavacca tre devota al S. Ermakora, unua episkopo de Akvileja, volis konstruigi preĝejeton al lia honoro. En la jaro 1553 la preĝejo estis solene inaŭgurita. Ĝi estis apude la nuna kazerno "G. Savorgnan".

Inter la Deksepa kaj la Dekoka jarcento multaj noblaj familioj starigis multenombrajn palacojn, beligitaj per freskoj faritaj de grandaj pentristoj kiel Quaglio (Laino Valo de Intelvi, Komo, 1668 – tie, 3 julio 1751), Jozefo Morelli (Modena, 1749 – Udino, 1829), Canal (Kanal) (Venecio, 1 septembro 1745 – tie, 5 decembro 1825).

En la jaro 1825 Francisko Braidia transformis la postajn ejojn de la nuna kazerno "G. Savorgnan" en sukerrafinejon, kaj tiujn sur la strato en oficejojn. Ĝi laboris plenritme dum kelkaj jardekoj por transformi krudajn sukerojn venante el Kubo kaj Brazilio, sed pro la eksterlanda konkurenco, kiu transformis sukerbeton, la entrepreno perdis gravecon tiom ke en la jaro 1865 la komunuma Konsilio decidis aĉeti la konstruaĵon por ĝin transformi en kazernon. La 11an de majo 1836 estis interrompita la kredo ĉe la apuda preĝejo S. Ermakora. La meblaro estis poste forportitaj de Arcano-anoj en la mjaro 1864.

En la jaro 1834 estis disfalgita la malnova pordo ena. La strato estis larĝigita kaj pasigita supre novan ponton de la Rojo. Estis delokita ankaŭ la memoriga cipo de la ponto konstruita sub la venetia regado.

De la jaro 1871 la teretaĝo de la Pordego estis destinita al akcepta oficejo de la akcizo. El tri arkoj, kiuj fermas straton Akvilejan, la unua tiu kunigita al la turo estas origina, tiu centre rekonstruita en la Deknaŭa jarcento, la tria arko de la pordego, tiu pli eksterna, estas artaĵo de Hektoro Gilberti (Udino, 1876 – tie, 1935) kaj ĝi reiras al la jaro 1925.

Dum la dua mondmilito la strato, pro la proksimeco kun la stacidomo, estis tre bombita.

Estis detruita la Karmela konvento kaj ankaŭ la malnova paroĥejo S. j Petro kaj Paŭlo. La pordego, malgraŭ ne trafita rekte, suferis de la gravaj bombadoj, kiuj detruis preskaŭ la tutajn konstruaĵojn ĉirkaŭaj kaj malfermis grandajn fendojn en ĝiaj masonadoj. En la jaro 1953 oni eĉ pensis, por plifaciligi la trafikon, disfali la du arkoj pli fruaj. Feliĉe venkis la saĝeco kaj en la jaro 1960 la Komunumo prizorgis sanigan restaŭradon.

### **Kvartalo Gemona (Ĝemona)**

Antikve la norda parto de la Kastelo konstituis la Superan Vilaon. Ĉar tie fluis la Rojon ĝi estis dirita Riul, Rojo kaj ankaŭ Bòrc de San Quirin (Kvartalo S. Kvirino) pro la preĝejo kaj la konvento ekzistantaj ekster. Pordego Ĝemona. La konvento, en la jaro 1395, kaj la preĝejo, en la jaro 1571, estis forigitaj.

Poste superis la nomo Ĝemona pro la omonima pordego, kiu en la dua murzono estis inter palaco Bartolini kaj strateto Lenna. Poste pro la konstruado de la kvina murzono, Pordego Ĝemona estis transportita funde la nuna strato, kie hodiaŭ esta placo Osoppo.

En la jaro 1556 laŭ desegno de Palladio, de familio Antonini komenciĝis la konstruado de palaco, kiu estis la sidejo de la eks Itala Banko. Ĝi gardas gravajn freskojn de Odoriko Politi (Udino, 29 januaro 1785 – Venecio, 18 oktobro 1846).

En la kvartalo pasigis la infanecon ankaŭ Johano de Udino (Udino, 27 oktobro 1487 – Romo, julio 1561), kies familio aĉetis ĉi tie domon, kiun ancorau oni povas vidi ĉe la angulo de strato Johano de Udino.

En la jaro 1472 bando da Turgoj alvenis ĝis Pordego Ĝemona kaj incendiis la unuan preĝejon dediĉita al S. Kvirino, kiu estis ekstere de la muroj, en placo Osoppo. Aro da bravuloj estritaj de Martino Vincenzi fuĝigis ilin estinginte la incendion. Poste kun la tempo la preĝejo ruiniĝis kaj ĝi estis detruita.

Estis necese nova preĝejo kaj patriarko Francisko Barbaro (Venecio, 16 marto 1546 – tie, 6 aprilo 1616) post kiam dividis en la jaro 1595 la urbon Udino en paroĥeojn, antaŭenpuŝis la konstruadon la 28an de aŭgusto 1599. La preĝejo estis finita en la jaro 1686. En la jaro 1677 la titolo estis ŝanĝita en "Madono de la

Mizerikordo” kaj en la jaro 1701 ĝi alprenis la nunan titolon S. Kvirino. La sonorilejo estis konstruita inter la jaroj 1723-1725.

En la domoj apude palaco Antonini, naskiĝis gastejo nomita “Ĉe la Puto” pro la putoj, kiu estis centre de la placeto. Oni rakontas, ke kliento pro la tro drinko tie dronigis mizere. Tiu do estis fermita kaj la gastejo ŝanĝis nomon en tiun de “Ĉe Monaĥoj”.

Grafo Francisko de Toppo (Udino, 13 aprilo 1797 – tie 19 februaro 1883), udine’a erudito, arkeologo kaj literaturisto, fondis la omoniman kolezion, kiu estis malfermita en la jaro 1900.

En la jaro 1951 oni kovris la rojon, kiu laŭiris malkovrita de strato Johano de Udino al placo Osoppo. En la jaro 1967 estis konstruita la nova preĝejo, laboro de inĝ. Antono De Cillia (Udino, 16 marto 1921 – 2010). Vidalvide la nova preĝejo, en la jaro 1972 oni disfalis murparton de ĉirkaŭbarado de la Kolegio Uccellis, por meti en lumon la fasadon de la dekvarjarcenta preĝejo S. Klara.

### **Kvartalo Grazzano (Gracano)**

Grazzano estis unu el la malsuperaj vilaoj, kiuj ĉirkaŭis la Udine’a kastelo.

En dokumento de la 3<sup>o</sup> de jaulio 1231 oni legas “D. Patriarcha Bergoldus concedit D. Wicardo de Utino filio D. Henrici de Tricesimo molendinum cum fulugno extra Portam Grezani”. Patriarko Bergoldo donis al Wikardo de Udino, filo de Henriko de Tricesimo, muelejon ekster Pordego Grazzano – kaj en unu de la 31<sup>o</sup> de januaro 1427 - ... domon lokita en Udino en Kvartalo Grazzano apud la Kvartalo S. Georgo.

Antikve ĝi dividiĝis je du partoj. De placo Katedralo al placo XX Septembro, kie estis pordego kaj prezentis Bòrc di déntri (interna Kvartalo); de la pordego ĝis la lasta murzono kie nun estas alia pordego, disfalgita en la jaro 1822, kiu estis Bòrc de fùr (ekstera Kvartalo).

En la Kvartalo oni rakontas la jenan legendon: kiam S. Georgo plenkompete armita iris tra la mondo, estis unu tagon ĉe lageto apude “Borg Grassan (Kvartalo Gracano). Li ekvidis sub la ponto dikan bufon, kiu estis la teruro de ĉiuj. La Sanktulo faris la Krucosigno, spronis la ĉevalon kaj alnajlis per lancopiko al la traboj de la ponto. Poste li diĉevaliĝis, prenis la beston, ĝin li ligis bone al la selo kaj kun tiu predo rajdis ĝis Kvartalo Grazzano. Kiam kvartalanoj vidis la Sanktulon kun la bufo tiom timita lin akklamis kaj lin elektis kiel ilian patronon. Por plupruvi ilian dankemon ili permesis ke ĉiujare la dikega bufo dancu unu fojon, du horojn antaŭe la sunsubiro.

De tiam kvartalanoj de Kvartalo Grazzano estis nomitaj “crotàrs” (tiuj de la bufoj). Kaj ĉiujare, en la Kvartalo oni tenas la tradician ran- kaj bufofeston kie la tipa plado estas prezentata de tre bongustaj ranoj. La legendo eble prenas vivo nel la fakto, ke la Kvartalo estas la plej malalta en la urbo kaj ĝi estis marcĉejo.

Sur tereno donacita de Tristano Savorgnan (1377 – 1440) en la jaro 1427 lokita en strato de la Vito, naskiĝis konvento kaj preĝejo nominataj S. Francisko de la Vito aŭ ekstere por ĝin distingi de tiu en placo Malnova Hospitalo. Tiu preĝejo akiris ian renomon, gardas diversajn pentraĵojn kaj tie estis entombigitaj nobelaj familioj.

Kun la alveno de Napoleono (Ajaco, Korsikio, 15 aŭgusto 1769 – Insulo S. Helena, Atlantiko, 5 marto 1821) en la jaro 1808 la preĝejo kaj la konvento estis forigitaj kaj ili iĝis ŝtatpropraĵo. La preĝejo estis duondetruita de incendio en la jaro 1855, dum la konvento estis destinita al militforno kaj ĝi utilis ankaŭ kiel loĝejo por la familioj de suboficiroj. Ĝi estis damaĝita dum bombado en la jaro 1945 kaj poste mutilita pro la malfermo de strato de la Vito.

En la angula domo de la strato kun placo Garibaldi, naskiĝis Johano Ricamatore, plibone konata kiel Johano de Udino (Udino, 27 oktobro 1487 – Romo, julio 1561), elstara pentristo.

Apude la kvartalo en la Deksepa jarcento naskiĝis la Udine’a Akademio de Sventatoj, praa de la Akademio pri Sciencoj kaj Literaturoj, el la plej antikvaj en Italio.

Ĉe la stratnumero 16 havis sidejon la Profesia Instituto Ina “Eŭgeno Bianchini” (Biakis, Pulfero, Udino, 7 marto 1863 – Udino, 1921), starigita en la jaro 1900, kiu havis la nomon de ĝia fondinto, la paroĥestro de la preĝejo S. Georgo.

### **Kvartalo Poscolle (Poskole)**

Ĝi estis unu el la kvartalo plei antikvaj. Dum la Itala Reg, la strato estis dirita Eŭgena.

Ĉe la komenco de la Deknaŭa jarcento, en la palaco D’Attimis – Maniago, vivis Fabio de Maniago (Udino, 25 junio 1774 – tie, 31 majo 1842), erudito verkanto pri arto. Li vojaĝis tra la tuta Italio, en Germanio, Francio kaj Anglio alprenante riĉan artan sperton konsultante multenombrajn arkivojn.

Li eldonigis en Venecio en la jaro 1819 *Historion pri la friulaj artoj* kaj *Kvido pri Udino* eldonita en la jaro 1825.

Ek antaŭ kelkaj jaroj, antaŭ ol ĝi estu disfalgita, ĉe la stratnumero 24 de strato Poscolle estis la antikva Hotelo “Romo”. Iam ĝi nomiĝis “Ĉe Ĉevaleto” kaj tie haltis multaj italaj patriotoj kondamnitaj al Spielberg (Memorŝtono memorigas la pason).

En la jaro 1925 oni komencis la konstruaĵon de la Osteja Templo, por kunigi la restaĵojn de soldatoj falintaj dum la unua mondmilito. Ĝi estis finita en la jaro 1931, akceptante 25.000 restaĵojn.

Funde Kvartalo Poscolle, en placo XXVI Julio, estas la Monumento al la Rezistado, artaĵo de la jaro 1969 de ark.-oj Ĝino Valle (Udino, 7 decembro 1923 – tie, 30 septembro 2003) kaj Frederiko Marconi (n. Sankta Vito de Taljamento, Pordenono, 3 aprilo 1932), kun skulptaĵo (1969) de Dino Basaldella (Udino, 26 aprilo 1909 – tie, 7 januaro 1977). Epigrafo memorigas la 3.463 Falintojn kaj Disperdiĝintojn kaj la 10.000 deportitojn kaj la 17.124 partizanojn batalantaj garibaldi-anoj kaj osovanoj (Osoppo-anoj) kiuj, dum 22 monatoj bastalis en la Liberiga milito en Friulo. La ĉizitaj vortoj estas de Piero Calamandrei (Florenco, 21 aprilo 1889 – tie, 27 septembro 1956) kaj ĝi estis inaŭgurita la 25an de aprilo 1969.

Dum la Kindekaj jaroj estis disfaligita la antikva pordego de Poscolle.

Beligita per palacoj je diversaj epokoj, Kvartalo Poscolle estis ankaŭ dirita la "Granda strato" pro la butikoj kaj la ĉeestantaj palacoj. Ĝi havis multajn gastejojn el la plei renomaj en Udino, el kiuj "Leporo" kaj "Romo", dum multaj jaroj kunvenejo de la gazetara klubo.

La nuna placo XXVI Julio, kiu anstataŭas la antikvan pordegon, alprenas la nomon memore al la eniro de la Itala Armeo en Udinon en la jaro 1866 kaj de tiam el la rigardanta aleo estis donita la nono Aleo Venecio.

### **Kvartalo Pracchiuso (Prakiuso)**

Pracchiuso estis antikve unu el la vilaoj, kiuj ĉirkaŭis Udinon.

Pracchiuso estis dirita ankaŭ Borg de S. Gervâs (Kvartalo S. Gervazo) pro la preĝejo titolita al S.j Gervazo kaj Protassio, kiu estis kie hodiaŭ estas la konvento Madono de la Gracioj.

La vilao Pracchiuso estis enprenita en la urbon per la konstruo de la kvina murzono, necesigita pro la militaj intencoj de Ludoviko IV, dirita la Bavaro (Munkeno, 1 aprilo 1282 - Fürstenfeldbruck, 11 oktobro 1347), kaj realigita de la jaro 1328 al la jaro 1440.

Oni malfermis la pordegojn Cividale (Ĉividale) kaj Cassina (Kasina). La unua iĝis pordego Pracchiuso. La dua estis fermita en la jaro 1412 ĉar opinnita malmulte sekura.

En la jaro 1479 pro la dekadenco kaj konsekvenca forigo de la ordeno, celestanoj lasas la preĝejon S. Gervazo al Servistoj de Maria, alvokitaj de Guberniestro Johano Emo (Venecio, 21 februaro 1419 – Lagoskuro, Feraro, 15 septembro 1483), kiuj ĝin titolis laŭ la nomo Virgulino Maria. Servistoj komencis ilian oficon kaj samtempe la konstruaĵon de la monaĥejo kaj la restaŭradon de la preĝejo. La 14an de februaro 1513 oni starigis la frataron S. Valenteno.

Tiu frataro baldaŭ klopodis konstruante la novan preĝejon kaj atingante ke ĝi iĝu paroĥejo.

En la jaro 1672, duone strato Pracchiuso, oni starigis triaordenan monaĥinejon de Servistoj de Maria, diritaj de la Beata Virgulino de la Sep Doloroj. La monaĥinejo estis en la jaro 1689, dank'al donacio de bieno, unuigita kun la preĝejo S. Valenteno.

La frataro S. Valenteno petis al la Udine'a Komunumo la starigon de foiro aŭ festo por celebri sian Sanktulon, kion obtenis la 20an de februaro 1688, kaj ĝi okazis la unuafoje dum la tagoj 14-15-16 februaro 1689.

Dum la franca okupado, kun la forigo de la religiaj ordenoj, Servistoj lasis la Graciojn; la konvento de Aŭgustianinoj estis rekviziita kaj ĝi estis destinita al kazino, la nuna "Di Prampero", sidejo de la Alpa Brigado "Julia". Ankaŭ la konvento de la Virgulino de la Sep Doloroj estis destinita al militaj uzadoj.

En la jaro 1899 estis disfaligita Pordego Pracchiuso aŭ tiu, kiu restis; la turo fakte estis disfaligita en la jaro 1846 ĉar kaduka.

Ĉiam en la jaro 1899 la preĝkapeleto estis donita al paroĥestro de la Gracioj. Ĝi estis restrukturata kaj la 29an de decembro 1901 ĝi estis rekonsekrita, al S.S. Redemptoro (en la jaro 1957 ĝi estis dediĉita al S. Antonio de Padova), per celebrado oficita de ĉefepiskopo Petro Zamburlini (Banjoli de Supre, Padova, 15 decembro 1832 – Artenja, Udino, 1 decembro 1909).

En la jaro 1935, dank'al malavareco de fratoj Venerio kaj de Marko Volpe, starigis la Geriatria Instituto, kiu ankoraŭ hodiaŭ havas sidejon en la strato ankaŭ kun enirejo en strato S. Aŭgusteno. En la jaro 1999, en la konstruaĵo kiu akceptis la Militan Hospitalon havis sidejon ankaŭ la Udine'a Rekrutejo kaj la Departemento pri Jurmedicino de la Universitato.

Kvartalo Pracchiuso naskiĝis diversaj homoj kaj virinoj eminentaj. Oni memoras el la plej eminentaj Bonaldo Stringher (Udino, 18 decembro 1854 – Romo, 24 decembro 1930), fondinto de la Itala Banko kaj Tina Modotti (Udino, 17 aŭgusto 1896 – Meksiko, 5 januaro 1942) fotistino je monda famo.

### **Kvartalo Sankta Lazaro**

Dum la antikvaj tempoj la hodiaŭa strato Anton Lazaro Moro estis popole dirita S. Lazaro. La gastejo picejo "Alla Lupara" (Ĉe la Boata lanterno) sin apogas ankoraŭ hodiaŭ al la malnovaj muregoj.

Ekster la murzono, estis en la XIII jarcento leprulejo, kie Uccelluto de Uccellis en la jaro 1285 starigis preĝejon dediĉita al S. Lazaro.

Neniigita la lepro, la azilo estis asignita al la Majora Hospitalo, do, de la jaro 1564, ĝi estis estrita de Kapucenoj, kiuj poste transloĝiĝis al strato Tiberio Deciani.

Dum la unua duono de la Delsesa jarcento laboris en la kvartalo pentristo Johano Baptista Grassi (Udino, 1525 ĉirkaŭ – tie, 18 junio 1578), skolano de Pordenone (Pordenono, 1483 ĉirkaŭ – Feraro, 14 januaro 1539), kiu freskis palacon en strato Mantica.

En la jaro 1571 la azilo S. Lazaro estis eldetruita pro militaj kialoj.

En la jaro 1733 oni starigis la preĝejon de la Redemptoro kaj S. Lucia, Ankoraŭ hodiaŭ paroĥa, ĝi estis iĝita paroĥo en la jaro 1747, malgraŭ ĝi estis finita nur en la jaro 1838. De la jaro 1747 alvenis Aŭgustenanoj, kiuj starigis konventon kaj tie ili restis ĝis la jaro 1772, jaro de la forigo de la ordeno. Postvenis Klararinoj de S. Nikolao ĝis la jaro 1805.

Dum la franca okupado la lazareto estis destinita al milita tombejo kaj tiele ĝi restis ĝis la jaro 1849, kiam ĝi estis destinita al tiu celo terenon funde strato Pracchiuso.

La konvento, kiu estis de Klararinoj, post la franca rekvizicio estis, en la jaro 1866, sidejo dum jarcento ĉirkaŭ de la Financoficejo.

Ĉe la stratnumero 47 naskiĝis Johan Baptisto Periz (Udino, 14 septembro 1898 – Mathausen, Aŭstrio, 3 marto 1945), la juna laboristo udine'a, unu el la unuaj kontraŭfaŝistoj de Udino kontraŭi la invadan faŝistan skipan perfortemon kaj deportita al Mathausen. Li estis ordenita per la arĝenta medalo pro milita valoro dum la dua mondmilito.

La nuna nomo de la strato estas dediĉita al la naturista pastro naskiĝita en S. Vito de Taljamento en la jaro 1687 tie forpasita en la jaro 1764.

En la strato vivis kaj laboris dum periodo ankaŭ fratoj Dino (Udino, 26 aprilo 1909 – tie, 7 januaro 1977), Mirko (Udino, 28 septembro 1910 – Kembriĝo, Masaŝuseco, 24 septembro 1969) kaj Afro Libio Basaldella (Udino, 4 marto 1912 – Zuriko, Svisio, 24 julio 1976) famaj pentristoj kaj skulptistoj.

## **Kvartalo Villalta**

Ĝi estis la vojo kiu kondukis al kastelo de Villalta, apartenanta al unu el la familioj pli eminentaj de la Friulki-a Patrio.

Ek la jaro 1335 malfermis tie Pordego, en la konstruonta kvina murzono de la urbo.

Ĉe la antaŭvidiĝo de la turka minaco, ĉirkaŭ la duono de la Dekkvina jarcento, la tuta defenda sistemo de la urbo estis plifortigita. Intendanto pri tiuj laboroj estis Johano Emo (Venecio, 21 februaro 1419 – Lagoskuro. Feraro, 15 septembro 1483). Memorstono lokita sur la turo memorigas la intervenon.

La "Historiaj" stratoj de Kvartalo Villalta estas prezentate de strato Villalta kaj de strato Supera.

La centro de la kvartalo pliiĝas inter tiuj du karakterizaj stratoj kaj ilia vojkonfluejo elstaras la antikva Turo Villalta, konstruita inter la fino de la jaro 1400 kaj la komenco de la jaro 1500.

Ĉe ĝia bazo malfermis unu el la ses pordegoj de la kvina murzono.

Apude la Turo estas la konato Vilao Dormisch, konstruita en la fruaj de la jaro 1900, je Florstilo; ĝi estis la dommastra vilao aligita al la ominima bierfabriko, fama en la tuta Italio dum pli ol jarcento. La vilao alrigardas placon Cavedalis.

## LISTO DE LA LOKNOMOJ KUN INDIKO DE LA PALACOJ TIE LOKITAJ

**STRATO AKVILEJA** - Nomo hodiaŭ limigita al unu sola parto de la Borg d'Olée per tiu nomo oni indikis la vojjon, kiu de la nuna Placo de la Libereco (eks Viktorio Emanuelo) alportis al la pordego dirita Akvileja.

1. - Palaco De Rubeis - Perusini, strato Akvileja n.ro 1.
2. - Palaco Pontoni, strato Akvileja n.ro 2, angulo strato Piave.
3. - Palaco Trento - Ĝirardis, strato Akvileja n.ro 3.
4. - Palaco Rubini, strato Akvileja n.ro 4.
5. - Domo D'Arkano, strato Akvileja n.ro 8.
6. - Palaco Del Ĝudiĉe - Rokis, strato Akvileja n.ro 16.
7. - Palaco Sabbadini - Del Torso, strato Akvileja n.ro 17.
8. - Palaco De Kolloredo, strato Akvileja n.ro 22.
9. - Domo Morelli de' Rossi, strato Akvileja n.ro 26.
10. - Palaco Daneluci - Deĉani - Brajda, strato Akvileja n.ro 33, angulo strato Ĝusti.
11. - Domo Arkano - Varmo - Buiatti, strato Akvileja n.ro 41.
12. - Domo Brajda, strato Akvileja n.ro 42.

**STRATO BARTOLINI** - Ĝi estas vojparto, kiu de Placo Markoni direktiĝas al Placo S. Kristoforo. Antikve ĝi estis parto de strato Supera aŭ Ĝemona, kiu de Merkatovekjo direktiĝis al la homonima Pordego. Hodiaŭ ĝi memorigas la familion de grafoj Bartolini, kiu de jarcentoj loĝis la palacon de la Urba Biblioteko

13. - Palaco Andriotti, strato Bartolini n.ro 3.

**STRATO BEATA ODORIKO EL PORDENONO** - Ĉi tiu strato, antikve, titoliĝis Sankta Francisko interne pro la Preĝejo kaj la Konvento de Minoraj Konventualoj. Poste ĝi estis nomita de Batùz ĉar tie havis sidejon tiu Fratara, kiu estis la origino de la Hospitalo Sankta Maria de la Mizerikordo, kiu transloĝiĝis ĉe la komenco de la XIX jarcento al la sidejo de la Konvento. Do la strato alprenis la nomon Strato de la Hospitalo, kiu ĝin plutenis ĝis la jaro 1923 kiam ĝi estis dediĉita al la memoro de la beata Odoriko el Pordenono, franciskano, misiisto (Villanova de Pordenono, inter 1280 kaj 1285 - Udino, 14 januaro 1331), kiu estis entombigita en la Preĝejo S. Francisko aŭ de la Hospitalo, kie li restis ĝis la jaro 1770 kiam li estis transportita al la Karmelana Preĝejo en kies konvento estis translokitaj Franciskanoj post kiam ili vendis ilian al la Hospitala Administracio.

14. - Antikva Hospitalo S. Maria de Batitaj, strato beata Odoriko el Pordenono n.ro 3/5.

**STRATO BRENARI** - Ĉi tiu strato, antikve, estis enirkoridoro kun la eniro en Poskolle, fermita kiel la apuda strateto Raddi; ĝi estis plilongigita, al Gracano, kaj malfermita en la jaro 1382. Neniu alia strato havis multe da nomoj kiel tiu, el la nomo de la familioj, kiuj tie loĝis. En la XVI jarcento aperas la nomo Brenárs ĉar eble tie estis butikoj de bridoproduktistoj (friullinge brenis). Tiu nomo poste venkis.

15. - Naskiĝa domo de Johano el Udino, strato Brenari n.ro 28, angulo placo Garibaldi n.ro 14

**STRATO KANĈANI Paŭlo** - Ĉi tiu strato havas la kuriozan nomon Spelevilàn aŭ des Rostis ĉar rojeto ĝin trairis, kaj ankaŭ de macèl - buĉejo pro la apuda buĉejo en placo Merkatonuovo. De longe ĝi estis dirita lis traconaris ĉar tie kutime eksponis budojn taconàrs aŭ ŝuistoj kaj ledvendistoj, ŝuojn kaj lignoŝuojn; pli poste ĝi estas dirita des pesc'iaris, en la peco de placo Matteotti (eks Merkato nova) ĝis Strato Kavur, ĉar ĝi estis destinita al fiŝbazaro la angula ejo inter stratoj Rialto kaj Kanĉani. Fine aperas la nomo, ankaŭ ĝi kurioza, de Strazzamantello - ĉifi mantelon, en la peco de Strato Kavur ĝis Placo XX Septembro, kiu restis ĝis la jaro 1877, koncerne la fakton ke la avidaj komercistoj tie senmonigis kaj interbatalis klientojn, ilin tirante kaj preskaŭ ŝiri la vestojn.

16. - Domo Paskvotti - Fabris, strato Paŭlo Kanĉani n.ro 12, angulo strato Kavur.

**STRATO KARDUĈI Josuo** - Nova strato malfermita tra la Kampo Arkoloniani entenita inter la stratoj Gorgi kaj Rosta, la Rojo kaj la antikvaj muroj. Ĝi estis nomita per decido 19an de aprilo 1907

- 17. - Palaco jam Gropplero, strato Karduĉi n.ro 1.
- 18. - Palaco Kiaruttini, strato Karduĉi n.ro 15/17.
- 19. - Domo Rubacer - Sandrini, strato Karduĉi n.ro 28.
- 20. - Domo Vuga, strato Karduĉi n.ro 36, angulo strato Ĝusti.
- 21. - Palaco Del Torso, strato Karduĉi n.ro 44  
Domo Montemerli, strato Karduĉi n.ro \_\_\_.

**STRATO KORTAZZIS** - Tiele nomita ĉar tie estis kortoj plene de rubaĵoj el magazenoj de komercistoj en Merkatonuovo.

- 22. - Palaco Skaini, strato Kortacis n.ro 1 A.

**STRATO KUSSINJAKO** - Ĝi alprenis la nomon en la jaro 1871. Dum la faŝista periodo ĝi estis ŝanĝita kun Strato Emanuelo Filiberto Duko de Aosto, sed per decido de la 8a de februaro 1946 estis restarigita la origina nomo.

- 23. - Domo Dall'Akva - De Puppi, strato Kussinjako n.ro 5.

**STRATO DANTO** - Ĝi estis nomita per decido 16an de oktobro 1905. Ĝi estis parto de la Kampo Arkoloniani.

- 24. - Palaco Agrikola - Magini, strato Danto n.ro 10.

**STRATO DE LA SALO** - Ĝi estis nomita de la Mulin pro la muelilo detruita en la jaro 1927, poste de la Salo pro la saldeponejoj ekzistantaj en la domo de Frattina-anoj nun de la Agrara Asocio.

- 25. - Domo Pirona, strato De la Salo n.ro 12.

**STRATO ĜEMONA** - En la pli foraj tempoj la parto de la urbo Norde de la Kastelo konstituis la Kvartalo Supera kaj la nuna Strato Ĝemona ne havis ĝian apartan nomon. Ĝi estis dirita S. Kvirino pro la preĝejo kaj la Konvento de S. Kvirino. En la jaro 1294 estis starigita la Konvento S. Klara, kiu utilis ankaŭ nomi la tutan kvartalon ĝis venkis la nomo Ĝemona.

- 26. - Palaco Antonini Domo Granda, strato Ĝemona n.ro 5.
- 27. - Domo de Johano el Udino, strato Ĝemona n.ro 15 A.
- 28. - Domo Bisanti - Ĉernazaj, strato Ĝemona n.ro 20.
- 29. - Domo Tomada - Kairoli, strato Ĝemona n.ro 32.
- 30. - Palaco Polĉenigo - Garzolini - Toppo - Vassermann, strato Ĝemona n.ro 92.

**STRATO MALNOVA GIMNAZIO** - Post la forigo de Barnabanoj, en la jaro 1810 ĝi iĝis sidejo de Gimnazio, kiu donis al la vojo la nomon Gimnazia strato, dum kelka tempo nomita Kvartalo Jesuo. En la jaro 1925 ĝi estis ŝanĝita laŭ la nomo de Pio Piskiutta, faŝista junulo falinta dum batalo. Per decido de la 1a de julio 1947 estis restarigita la antaŭa nomo kun la eldono "Malnova".

- 31. - Eks Kolegio Barnabanoj, strato Malnova Gimnazio n.ro 13.

**STRATO JOHANO DE UDINO** - En la fora tempo la loko nomiĝis Isule d'onde, la nomo ĝis nun viva en la popolo de Kvartalo Isule. Ŝajnas ke la nomo devenas de Insula, kiu signifas ankaŭ izola domo aŭ kampardomo. La strato estis titolita poste al la memoro de la fama udina pentristo.

- 32. - Palaco Ornjani - Agrikola - Di Kaporiako, strato Johano de Udino n.ro 23.

**STRATO GRACANO** - Ĝi estis unu el la kvartaloj Malsuperaj, kiuj ĉirkaŭis la udine'an kastelon. Kvartalo Gracano estas la plej malalta en la urbo kaj, eble antikve, ĝi estis marĉejo, kai tio klarigas la lokan legendon de la crot (rano).

- 33. - Palaco Ĝakomelli, strato Gracano n.ro 1, angulo Strato Brenari.
- 34. - Palaco Zinjoni - Margret, strato Gracano n.ro 7.
- 35. - Domo Desja -Tommasoni, strato Gracano n.ro 10.
- 36. - Domo Venconi, strato Gracano n.ro 16.
- 37. - Domo Varmo - Pers - Paskoli, strato Gracano n.ro 74.

**STRATO LIONELLO Nikolao** - Ĝi estas inter la Stratoj Kavur kaj Rialto. En la XIX jarcento ĝi estis dirita Strato Kortelacis el la familio, kiu posedis la domojn lokitaj kie hodiaŭ estas la fasado de la nova Urbodomo. Per decido 3an de majo 1877 ĝi estis dediĉita al la memoro de la udina oraĵisto Nikolao Lionello (Udino, 1400 - tie, 1462), arkitekto de la Urba Loĝio, post kiam dum unu monato ĝi portis la nomon Jakopo Marinoni.

- 38. - Palaco D'Aronko, strato Lionello n.ro 1.
- 39. - Palaco Susanna Karatti "Ĉe la Navo", strato Lionello n.ro 8.

**STRATO LIRUTI** - Ĉi tiu strato havas la nomon de la nobela familio el kiu naskiĝis la udinaj literaturistoj kaj historiistoj, Johanjozefo (Villafredda, Tarĉento, Udino, 28 novembro 1689 - tie, 4 majo 1780), Jozefo Antono (Udino, 1773 - 1812) kaj Inocento Maria Liruti (Villafredda, Tarĉento, Udino, 7 oktobro 1741 - Verono, 11 aŭgusto 1827), kiuj posedis la palacon hodiaŭ de Biasutti-anoj.

- 40. - Palaco Moiseko - Liruti - Biasutti, strato Liruti n.ro 2.
- 41. - Domo Karnjelli, strato Liruti n.ro 10.
- 42. - Domo Johano Juri (Domo Ruĝa), strato Liruti n.ro 12.
- 43. - Domo Rinoldi, strato Liruti n.ro 22.
- 44. - Palaco Agrikola, strato Liruti n.ro 36.

**STRATO MANIN Danielo** - Antikve la strato estis dirita Kvartalo Ĉividaldo interne, pli poste, post la konstruo de la preĝejo S. Antono, Kvartalo Sankta Antono interne kaj fine Kvartalo S. Bartolomio sekve de la starigo de la privata Kapelo de familio Gubertini okazita en la jaro 1451 ĉe la okcidenta angulo inter stratoj Manin kaj Prefektejo. Ĉi tiu preĝejo estis forigita en la jaro 1810 kaj igita privatan domon. La turo estas la sola ankoraŭ ekzistanta de la III zono. Nun la strato memorigas prezidenton de la Respubliko de Venecio de la jaro 1848.

- 45. - Palaco Kajmo - Dragoni, strato Manin n.ro 2, angulo placo Libereco.
- 46. - Palaco Manin, strato Manin n.ro 8.
- 47. - Domo Vieci, strato Manin n.ro 12.
- 48. - Palaco Kontarini (Ora palaco), strato Manin n.ro 15.
- 49. - Palaco Pavona - Askvini, strato Manin n.ro 16.
- 50. - Domo Brajda - Karatti, strato Manin n.ro 17.
- 51. - Palaco Mantjka - Kicola, strato Manin n.ro 18 A.
- 52. - Domo Gori - Prividori, strato Manin n.ro 19.

**STRATO MANTJKA Francisko** - Antikve ĝi estis parto de Kvartalo Sankta Lazaro. La strato estis nomita Kvartalo Redemptoro ĝis ĝi ne estis destinita pludaŭrigi la memoron de la udina Juristo Francisko Mantjka (1534 – 1614).

- 53. - Palaco Montegnako - Berginc, strato Mantjka n.ro 7.
- 54. - Domo Andreuci - Zuko, strato Mantjka n.ro 26.
- 55. - Palaco Di Prampero, strato Mantjka n.ro 28.
- 56. - Palaco Montenjako - Berginc - De Konĉina, strato Mantjka n.ro 40.

**STRATO MARINONI Jakopo** - Ĝi memorigas la udinan matematikiston kaj astronomon Jakopo Marinoni (1676 - 1755) per decido 3an de majo 1877, post kiam dum unu monato ĝi havis la nomon Nikolao Lionello (Udino, 1440 - tie, 1462).

- 57. - Palaco Kolloredo - Ornjani, strato Marinoni n.ro 10.
- 58. - Palaco Fistularjo - Plateo - De Portis, strato Marinoni n.ro 14.
- 59. - Palaco Brajda, strato Marinoni n.ro 47.

**STRATO MARSALA** - Nova strato daŭrige strato De Rubeis al Kussinjako.

- 60. - Domo D'Aronko, strato Marsala n.ro 11.

**STRATO MAZZINI Jozefo** – En la pasinteco ĝi estis parto de Kvartalo S. Lucia.

- 61. - Palaco Mattioli - Kajmo - Fovra, strato Jozefo Mazzini n.ro 16.

**STRATO MERKATOVEKJO** – En la spaco inter la monteto kaj la fosaĵo kie estis kunigitaj la unuaj loĝantoj de la Kvartalo kaj kie devis okazi la ĉefaj agoj de ilia vivo ĝi iĝis ankaŭ la sidejo de la Merkato kiam la 13an de septembro 1223 ili ricevis de patriarko Bertoldo el Meranja la rajton fari merkaton. Merkato, kiu iĝis malnova la 12an de marto 1248, kiam estis konstruita la II<sup>a</sup> zono kaj la patriarko starigis alian novan en la placo, kiu formiĝis pro la delokado de la fosaĵo, tiu, kiu estas ankoraŭ hodiaŭ Placo Matteotti.

- 62. - Palaco Tealdi - Kampiutti - Dorta, strato Merkatovekjo n.ro 1, angulo supreniro Kastelon.
- 63. - Palaco Sakja, strato Merkatovekjo n.ro 2, angulo strato Rialto.
- 64. - Palaco Zorzi, strato Merkatovekjo n.ro 4
- 65. - Palaco Gaspardis - Lakin - Del Fabbro, strato Merkatovekjo n.ro 6.
- 66. - Palaco de la Lombardejo, strato Merkatovekjo n.ro 16.
- 67. - Palaco Sgualdino, strato Merkatovekjo n.ro 20.
- 68. - Domo Sabbadini, strato Merkatovekjo n. 22.
- 69. - Palaco Fabris - Domo Fornara, strato Merkatovekjo n.ro 30.
  - Domo Seiz, strato Merkatovekjo n.ro \_\_\_.
  - Domo Skala, strato Merkatovekjo n.ro \_\_\_.

**STRATO MORETTI** - Nova strato. Ĝi memorigas la udinan industrian meritulon Luizo Moretti (1822 - 1875).

- 70. - Palaco Moretti, strato Luizo Moretti n.ro 2.

**STRATO MURATTI** - Memorigas la garibaldi-ano, unu el la 70 de Vilao Glori.

- 71. - Palaco Muratti, strato Muratti n.ro 2, angulo Zanon n.ro 2.

**STRATO PALLADJO** - Ĝi estis parto, antikve, de la Supera Kvartalo. La nuna nomo memorigas la nobelan familion Palladjo de la Olivi, kiu loĝis fine de la strateto Kaiselli kaj al kiu apartenis la friulaj historiistoj Henriko (1590 - 1629) kaj Johanfrancisko (m. 1669).

- 72. - Palaco Florjo, strato Palladjo n.ro 8.

**STRATO PETRAKO** - Jam strato Prospero Antonini, ĉi tiu strato okupas la lokon, kiu estis parto de la antikva fosaĵo de la III zono. Ĉar tie ekzistis viandobutikoj, ĝi estis dirita ankaŭ plazze des beciarîs - placo de buĉistoj. Poste ĝi estis nomita placo Antonini kaj placo Ĉernazaj pro la Palaco konstruigita de Antonini-anoj en la XVII jarcento, pasita poste al la familio Ĉernazaj kaj nun Universitato de Udino. En la jaro 1877 ĝi estis nomita laŭ la nomo de la fama friula literaturisto kaj historiisto Francisko Prospero Antonini (Udino, 2 februaro 1809 - Florenco, 19 decembro 1884).

- 73. - Palaco Antonini - Ĉernacai, strato Tarĉisjo Petrako n.ro 8.



**STRATO PIAVE** - Ĝi deiras de la antikvaj Gorgoj. De la jaro 1923 ĝis la jaro 1926 havis tiun nomon la nuna Strato Sankta Vito de Taljamento.

74. - Palaco Paolini - Domo d'Orlandi (jam Manin de Varmo), strato Piave n.ro 2, angulo strato Viktorio Veneto.

**STRATO PORTANUOVA** - Antikve ĉi tiu strato estis sen eliro. En la jaro 1515 Guberniestro proponis malfermi pordeton en la murego de la tria zono por komforto al tiuj, kiuj intencis iri al Madono de la Gracoj kaj en la jaro 1522 estis aĉetita de familio Moises la tereno por la malfermo de la vojo, kiu tuj estis farita. Kie estis pordeto oni starigis Arkon, nomita Puarte gnove - Nova pordo, honore al Guberniestro Vincenzo Kapello. Tiam la strato alprenis la nomon Vie gnove - Strato nova, ĝis kiam la nomo Puartegnove - Portanova venkis kaj restis.

La Arko estis eltirita en la jaro 1902 kaj transportita al la enirejo de la Kastelkorto apud la Preĝejo.

75. - Domo Spilimberto - Iurica, strato Portanuova n.ro 17.

76. - Domo Bratteolo - Fabrici - Kirker, strato Portanuova n.ro 19.

**STRATO POSKOLLE** - Dum la Itala Regno la Kvartalo Poskollé estis dirita Strato Eŭgena, honore al Princo Eŭgeno de Beauharnais (Parizo, 3 septembro 1781 - Munkeno, Germanio, 21 februaro 1824). La pordego Poskollé havis la nomon pordego Venecio en la jaro 1866.

77. - Palaco Tritonjo - Moroldi - Beretta, strato Poskollé n.ro 6.

78. - Palaco de la Frattina - Coppola, strato Poskollé n.ro 8/C.

79. - Mezepoka domo de la Spicbutiko por sanuloj, strato Poskollé n.ro 13.

80. - Palaco D'Attimis - Di Maniago, strato Poskollé n.ro 43.

**STRATO de la PREFEKTEJO** - La pli antikva nomo de ĉi tiu strato estas Contrade dai fors - Kvartalo de fandformoj pro iuj fandformoj por la fondado de metaloj tie ekzistantaj, laŭ la muroj de la tria zono. Pli poste ĝi estis dirita Contrade dal Zuk - Kvartalo Zuko el la familio de sinjoroj Zuko, kiu tie loĝis kaj ankaŭ S. Bartolomio pro la Preĝejo lokita en la angulo kun strato Manin.

En la jaro 1662 Filipanoj aĉetis la domojn de la Heredantoj de Mattia el Kollaredo ilin igante Monakejon; forigitaj Filipanoj en la jaro 1810 la Monakejo pasis al Ŝtatbienaro kaj ĝi utilis al oficejoj de la Reĝa Delegitejo kaj poste al Prefektejo. Pro tiuj alternadoj la strato estis dirita de la Filipanoj, de la Delegitejo kaj fine de la Prefektejo.

En la jaro 1941 la strato estis nomita Konstancio Ĉano (Livorno, 30 aŭgusto 1876 - Ponto ĉe Moriano, Luko, 26 junio 1939) kaj en la jaro 1945 estis restarigita la nomo Strato de la Prefektejo.

81. - Domo Zuko - Belgrado, strato de la Prefekturo n.ro 12.

82. - Domo Specotti, strato de la Prefektura n.ro 15.

**STRATO RIALTO** - Ĉi tiu strato, historie, estas la plej grava el ĉiuj ĉar ĝi estis la tre antikva kvartalo Udino, kiu donis la nomon al la tuta urbo estiĝita el la kuniĝo kun la aliaj ĉirkaŭaj lokoj, kaj tiu strato nomiĝis, dum jarcentoj, Udino antonomazie.

En la jaro 1487 estis starigita buĉejo aŭ publika viandobutiko en la angula ejo inter Stratoj Rialto kaj Kanĉani kaj pro tiu fakto la strato alprenis la nomon Contrade des beciariis - Kvartalo de buĉistoj.

Nur en la XVI jarcento aperas la nomo Rialto. La nomo Riàlt - Rialto, je klara venecia origino, ŝajnas estis donita pro analogioj kun Rialto en Venecio; fakte ambaŭ estis la unua nukleo de la urbo; ili estis la ejo pli centra kaj pli vizitadita, proksima al merkatoj, kie la popolo kunvenis; plie en ĉi tiu strato havis la oficon *tiuĵ de Rialto*, tio estas la komisiitoj de la poŝta servo, kiuj havis oficejon en Venecio en Rialto.

En la jaro 1552 Francisko di Prampero estis akuzita ke li ĝissange bastonis staliston de la Trinkejo S. Georgo, kiu, ŝajnas, lin obstaklis dum liaj amoj al la filino de la trinkejestro. Dum lia pridemandado li neas la akuzojn kaj petita pravigi lian ĉeeston en tiu ejo je la 22 nokte, li respondas, ke tiu estas la ejo pli konata kaj vizitadita en la urbo, kie ĉiuj nobeloj kunvenas kaj ĝuste pro la alfluo de la publiko tiu ejo nomiĝas Rialto.

83. - Palaco Billja Konĉina, strato Rialto n.ro 5.

84. - Palaco Venier - Rosselli, strato Rialto n.ro 8.

**STRATO SABBADINI Cecila** - Por memori sinjorinon Cecila Gradenigo Sabbadini (Korfu, 1779 - Udino, 1864), fondantino de la Lernejo pri Agrikulturo en Pocuolo.

85. - Palaco de la Regiono, strato Cecila Gradenigo Sabbadini n.ro 31.

**STRATO S. FRANCISKO DE ASIZO** - Ĉi tiu strato, antikve, estis dirita de la *Rakedo* ĉar tie estis kampo por tiu ludo ĉe la angulo kun Placo Ĉefpreĝejo.

Sur tiu kampo familio Mantjka konstruis teatron, kiu en la jaro 1754 estis aĉetita de patriarko Danielo Delfino (Venecio, 22 januaro 1688 - Udino, 13 marto 1762), kiu ĝin transformis en la nuna Preĝejo de la Pureco.

Ĝi estis indikita ankaŭ laŭ la nomo *Androne dal pelegrin* - Strato de la pilgrimanto pro la ŝildo de trinkejo; aŭ *Enirkoridoro de Bergamin* de unu el la proprietuloj de la sama trinkejo. Laste ĝi estis dirita de la Malnova Teatro ĝis kiam ĝi ne estis dediĉita al Sanktulo el Asizo per decido 25an de septembro 1926.

86. - Domo Anjola, strato S. Francisko n.ro 27.

**STRATO SARPI Paŭlo** - De strato Bartolini ĝis Merkatovekjo, antikve, ĝi estis dirita strato Ĝemona; de Merkatovekjo ĝis placo Merkatonuovo: Kvartalo S. Petro Martiro. De Merkatovekjo ĝis strato Valvason ĝi estis dirita ankaŭ strato de la Lilio.

87. - Antikva Fiŝbazono, strato Paŭlo Sarpi n.ro 12, angulo strato Erasmo Valvason n.ro 2.

88. - Palaco Zuko, strato Paŭlo Sarpi n.ro 12.

89. - Domo Lucato, strato Paŭlo Sarpi n.ro 18.

**STRATO SAVORNJANA** - Ĉi tiu strato, antaŭ la jaro 1764, ne interkomunikis kun strato Gorgi, sed daŭrigis kun strato Raŭŝedo. Ĝi havis diversajn nomojn: Savornjans ĉar ĉiam tie loĝis diversaj branĉoj de Savornjananoj kaj ĉar tie estis la oficejoj de iliaj multenombraj feŭdaj jurisdikcioj.

Post la jaro 1866 oni donis al tiu strato la nomon Aleksandro Manzoni (Milano, 7 marto 1785 - tie, 22 majo 1873) sed per decido 30an de oktobro 1876 oni redonis al ĝi tiun de Savornjananoj memore al la granda familio, kiu granda parto havis en la historio de la urbo kaj de Friulo.

90. - Domo Kavacini, strato Savornjana n.ro 5 - strato Kavur n.ro 14a.

91. - Palaco Valvason - Morpurgo, strato Savornjana n.ro 12.

92. - Palaco Galliĉi - Strassoldo, strato Savornjana n.ro 26.

93. - Palaco Skiavi, strato Savornjana n.ro 28.

**STRATO STRINGER** - Ĝi estas eks strato de Teatroj (Socia kaj Minerva) tiel nomita en la jaro 1931. Ĝi memorigas Bonaldo-n Stringer jam Direktoro de la Itala Banko.

94. - Palaco Susanna - Di Prampero, strato Stringer n.ro 5.

**STRATO TOMADINI** - Ĝi memorigas la kanonikan meritulon, kiu en la jaro 1836 fondis la orfejon, kiu havas lian nomon.

95. - Instituto Renati, jam Monaĥinejo de la Rozarie, strato Tomadini n.ro 13.

**STRATO TRENTO** - Ĝi estas paralela vojo kun aleo Triesto.

96. - Instituto Renati, jam Monaĥinejo de la Rozarie, strato Trento n.ro 4.

**STRATO TREPPO Malfermita** - Ĝi estas tiu peco de Strato Trento, kiu iras de strato Treppo ĝis la ejo de la antikvaj muroj kie estis la pordego Bon. Forigita en la XVIII jarcento la interna ĉirkaŭstrato inter la pordegoj Akvileja kaj Prakiuso restis senelira strato kaj ĝi alprenis la nomon Trep siarât - Treppo malfermita. Ĝi estis malfermita en la jaro 1909 kiam estis konstruita la strato tra la Kampo Bassi.

- 97. - Eks Seminario, eks Tribunalo, strato Treppo n.ro 4.
- 98. - Palaco Della Porta - Masieri, strato Treppo n.ro 7.
- 99. - Domo Kavarzerani, strato Treppo n.ro 12.

**STRATO VIOLA** - Tre antikva nomo komuna al aliaj kampaj stratoj; ĝi estas vorto, kiu signifas mallarĝa strato, malvasta kiel strateto, vojeto.

- 100. - Palaco Gorgo - Maniago, strato Viola n.ro 3.

**STRATO VIKTORIO VENETO** - Ĝi alprenis la nomon strato de la Poŝto, ĉar tiu oficejo de la jaro 1707 havis sidejon en ĉi tiu strato, kaj fine ĝi havis la nunan nomon.

- 101. - Domo Sabbadini - Kuogi, strato Viktorio Veneto n.ro 12.
- 102. - Palaco Della Forca Konĉina, strato Viktorio Veneto n.ro 18.
- 103. - Palaco Strassoldo - Mantjka, strato Viktorio Veneto n.ro 20.
- 104. - Domo Lovarja - Askvini, strato Viktorio Veneto n.ro 24.
- 105. - Palaco Lovarja - Galanda, strato Viktorio Veneto n.ro 26.
- 106. - Domo Tingi, strato Viktorio Veneto n.ro 36.
- 107. - Poŝta Palaco, strato Viktorio Veneto n.ro 42.
- 108. - Palaco Beretta, strato Viktorio Veneto n.ro 45.

**STRATO ZANON** - En la jaro 1871 ĝi estis baptita strato Zanon kaj en la jaro 1977 Antono Zanon el la nomo de la meritplena agronomo kaj industriisto (Udino, 18 junio 1696 - Venecio, 4 decembro 1770), kiu, en tiu strato, konstruis grandan silkŝpinojn.

- 109. - Jam Palaco Ornjani - Martina, strato Zanojn n.ro 1.
- 110. - Palaco Kamavitto, strato Zanon n.ro 4, angulo strato Muratti
- 111. - Palaco Politi - Kamavitto, strato Zanon n.ro 6.
- 112. - Palaco Braca, strato Zanon n.ro 16.
- 113. - Palaco Lovarja, strato Zanon n.ro 18.
- 114. - Palaco Klabassi-Sbruljo, strato Zanon n.ro 22.

**ALEO DUODO** - Ĝi memorigas heroan Mara Oficiro naskita en Kodrojpo en la jaro 1757 forpasita en Lissa en la jaro 1811.

- 115. - Domo Veritti, aleo Duodo n.ro 48.

**ALEO VOLONTULOJ DE LA LIBERECO** - Celebra nomo.

- 116. - Domo Fisketto, aleo Volontuloj de la Libereco n.ro 14, angulo strato Pordenono n.ro 1.

**STRATETO DE ARKANO** - Antikve ĉi tiu strato estis parto de la Kvartalo de Akvileja. En la jaro 1582 Elizabeta el Sbroivaka, proprietulino de la domoj hodiaŭ Kazerno "Savornjan", konstruis preĝejon dediĉita al Sankta Ermakora kaj de tiam la strato estis dirita Eniro S. Ermakore kaj poste Eniro dal Arciàn ĉar en la jaro 1638 Alfonse de Arkano aĉetis la domojn kaj la preĝejon de Sbroivaka-anoj.

- 117. - Domo D'Arkano, strateto D'Arkano n.ro 1.

**STRATETO DI PRAMPERO** - Tiele nomata ĉar najbara al la domoj, kiuj grafoj di Prampero aĉetis en la jaro 1691 de grafoj Askvini kaj kiuj estis la Hospitalo S. Hieronimo. Nun strato Artiko di Prampero, dediĉita al samurbano Ora Medalo falinta en la jaro 1941.

118. - Palaco Galliĉi - Strassoldo, strateto Artiko Di Prampero n.ro 13 B.

**PLACETO KAPUCENOJ** - Antaŭe nomita piazzutte dai Capucins la placeto estanta en strato Ronki ĉe la eniro de strato de la Seminario en korespondo kun la Konvento de Kapucenoj enloĝigitaj en la jaro 1831 en la ejoj de la eks Monaĥinejo de Kapucenoj.

119. - Palaco Kassini - Kamuĉjo, placeto Kapučini n.ro 8.

**PLACETO MELZI** - Nova loknomo.

120. - Palaco Torriani - Manin, placeto Karlo Melzi n.ro 2.

121. - Palaco Torriani, placeto Karlo Melzi n.ro 4a.

**PLACETO MALNOVA HOSPITALO** - Nuna nomo de la placo de la Hospitalo. Ĝi respondas al la legomĝardeno de la antikva konvento S. Francisko destruita en la jaro 1782 por la konstruo de la nova hospitalo. En tiu okazo estis malfermita la transirejo inter la Stratoj Beata Odoriko kaj Krispi.

122. - Palaco de la Malnova Hospitalo, placeto malnova Hospitalo n.ro 1.

**PLACO de la RESPUBLIKO** - Areo limigita de aleo Leopardi kaj de stratoj Romo, Ĉikoni kaj Karduĉi. Ĝi estas celebra loknomo, rilate la proklamadon de la Itala Respubliko.

123. - Palaco Piussi Levi, placo de la Respubliko n.ro 3/4, angulo strato Teobaldo Ĉikoni.

**PLACO ĈEFPREĜEJO** - La placo aŭ plibone la tri placoj, kiuj ĉirkaŭis la Ĉefpreĝejon respondas al la antikva Tombejo de la Preĝejo, kiu en la pasinteco etendiĝis ankaŭ al la areo okupita de la ĉirkaŭantaj domoj. La Placo, norde estis baptita laŭ la nomo de Patriarko Bertrando (Saint-Genies, Gaskonio, 1258 - Sankta Georgo de la Rikinvela, Pordenono, 6 junio 1350) en la jaro 1937. La placoj Ĉefpreĝejo kaj Beata Bertrando estis malaltigitaj kaj nivelitaj. La ŝtupetoj antaŭ la fasado de la Ĉefpreĝejo estis konstruitaj en septembro 1953.

124. - Palaco Di Prampero, placo Ĉefpreĝejo n.ro 6.

**PLACO GARIBALDI Jozefo** - Ĉi tiu placo estis, dum jarcentoj, loko forlasita kaj marĉa ĝis ĝi ne estis ordigita post la starigo de la Kolegio de Barnabanoj kaj precipe post la konstruaĵo de ilia preĝejo dediĉita al Sankta Laŭrenco Justinian jam ekzistanta kie hodiaŭ estas la centra parto de la konstruaĵo de la Teknika Instituto (nun Mezgrada Lernejo "A. Manzoni"). Ĉi tiu placo estis nomita Antonine pro la palaco konstruita en la XVII jarcento de Graciano Antonini hodiaŭ del Torso; de Barnabanoj pro la apudeco de ilia Kolegio, poste iĝita Gimnazio-Liceo kaj Teknika Instituto. Ĝi estis dediĉita al Garibaldi (Nico, Francio, 4 julio 1807 - Insulo Kaprera, Sardinio, 2 junio 1882) en la jaro 1866.

Ĝi estas superrigardata centre de monumento al li dediĉita de Gulielmo Mikieli (1855 - 1944).

En la domo ĉe la angulo kun Strato Brenari naskiĝis Johano Rikamatore, plibone konata kiel Johano de Udino. Kvar jarojn poste lia naskiĝo la familio transloĝiĝis al strato Ĝemona. Poste Johano reaĉetis la domon.

125. - Palaco Manĝilli - Del Torso, placo Garibaldi n.ro 18/19.

**PLACO de la LIBERECO** - Ĝi estas la Placo Viktorio Emanuelo post la 12an de majo 1945. La loknomo estis atribuita al la ĉefa placo de la urbo post la liberigo de la nazi-faŝisma regimo.

Ĉe la bazo de la Monteto de la Kastelo estis libera spaco dirita Placo aŭ Placo de la Komunumo ĉar tie estis la domo kaj la loĝioj kie kunvenis la Konsilio. Konstruita la tria zono en la XII jarcento la placo estis pliigita sude. En ĉi tiu malgranda placo haltis vinperistoj kaj oni aŭkcias la adjudikon de la vinakcizo kaj pro tio ĝis la fino de la XVIII jarcento ĝi estis dirita Vinplaco. La altigita parto rezultas, kontraŭe, el la disfaligo de antikvaj domoj kaj de la preĝejo Sankta Johano. Ĝi estis ordigita en la XVI jarcento dank'al guberniestro Kontarini (Venecio, 28 marto 1521 - tie, 10 aprilo 1577) el kiu ĝi tiris la nomon Placo Kontarene, nomo kiu en la XIX jarcento etendiĝis al Vinplaco. Oni diris ankaŭ placon S. Johano. En la jaro 1862 la du placoj de la Vino kaj Kontarene estis kuniĝitaj laŭ la nomo Viktorio Emanuelo II (Torino, 14 marto 1820 - Romo, 9 januaro 1878). La altigita parto de placo Kontarena, antaŭ la jaro 1866 estis nomita ankaŭ Gvardio, ĉar aŭstrianoj tenis konstantan Gvardiejon en la ĉambroj de la loĝio S. Johano. Centre de la placo en la jaro 1883 estis lokita la rajda monumento al reĝo, kie ĝis la aŭstria epoko estis metita la "pilorio". La 12an de majo 1945 al la placo estis trudita la nomo "De la Libereco". La 12an de novembro 1947 la monumento al Viktorio Emanuelo II estis transportita al la Ĝardenoj Rikasoli.

126. - Domo Malinjani, placo Libereco n.ro 2.

**PLACO MARKONI Gulielmo** - Ĝi estas la larĝigo de strato Paŭlo Sarpi, de strato Bartolini ĝis Merkatovekjo obtenita per la disfaligoj de la jaro 1931.

127. - Palaco Bartolini, placo Markoni n.ro 8.

**PLACO PATRIARKATO** - Kiam en la jaro 1610 estis starigita la Patriarkejo ĝi estis nomita de Patriarko kaj, post la forigo de Patriarkeco okazita en la jaro 1751, de Ĉefepiskopo, de Episkopo, Ĉefepiskopeco, Episkopeco. Ĝi reprenis la nunan nomon post kiam dum mallonga tempo estis nomita placo Rikasoli.

128. - Ĉefepiskopejo - Patriarkejo, placo Patriarkeco n.ro 1.

129. - Palaco Antonini - Belgrado, placo Patriarkeco n.ro 3.

130. - Palaco de la Udine'a Prokurorejo, placo Patriarkeco n.ro 4, angulo strato Lovarja n.ro 8.

131. - Palaco Mantjka, placo Patriarkeco n.ro 5.

**PLACO S. KRISTOFORO** - Nomo atribuita en la jaro 1960 por la ĉeesto de la samnoma Preĝejo.

132. - Palaco Kaiselli, placo S. Kristoforo n.ro 1, angulo strato Kaiselli.

**PLACETO ANTONINI** - Ĝi estas la larĝiĝo dekstre de strato Ĝemona, vidalvide strato Tarĉisjo Petrako, dediĉita al la nobela faminilo de Antonini-anoj.

133. - Domo Della Rovere, placeto Antonini n.ro 4.

134. - Palaco De Brandis, placeto Antonini n.ro 6.

**PLACO I MAJO** - Jam Princo Humberto. Ĝi rilatas la tagon, kiu de majo 1945 estas dediĉita al la "Festo de Laboristoj".

